

Bulgara Esperantisto

Septembro 1988



ENHAVO

- 3 80 jaroj de UEA: Edmond Privat (Ĥristo Gorov)
- 5 Botev-tagoj'88 (Atanas Ilkov)
- 8 Pri L. L. Zamenhof kaj Litovio (Canko Murgin)
- 9 Gaste al „Bulgara Esperantisto” (M. Bojaĝieva)
- 11 Monda Esperanto-Centro en Bjalistoko
- 12 La metodo de Andreo Cseh (Doc. Georgi Dimov)
- 14 Tra la mondo
- 15 Jubilea kanto por Esperanto (Simeon Simeonov, Dimitâr Terziev)
- 19 Jubileoj
- 23 Originala verkaro: La vera patrino (Konstantinka Arsova)
- 28 Distroj
- 29 Bulgara nacia kostumo
- 30 Enlanda movado
- 32 Deziras korespondi

REDAKTA KOMITATO

Ĉefredaktoro: Maria JANKOVA

Redakta Komitato: Atanas ILKOV (redaktoro); Dimitâr HAGIEV, Georgi MIHALKOV; Krástju KARUCIN; Kunčo VÁLEV; Libertaria MLADENOVA; Lidia RAEVA (respondeca sekretario); Mariana ELENOVA; Radoslav PARAŠKEVOV; Nikola NIKOLOV; doc. Stojčo STOJČEV; Venelin MITEV.

Pentristo: Penka PETKOVA

Teknika aranĝo: Ljubomir LAZAROV

Korektisto: Jordan ĈALJOVSKI

Administranto: Nikola NIKOLOV

ADRESO DE LA REDAKCIO: bul. „Ĥristo Botev” 97, 1303 Sofio, Bulgario; tel. 22-80-86.

Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov” — bul. „Lenin” 117, 1113 Sofio

Eldonkvanto — 6500 ekz.

Materialoj por la koncerna numero de „BE” estas akceptataj ĝis la 10-a de la kuranta monato — du monatojn antaŭe. La redakcio aperigas nur bonkvalitajn fotojn.

En Bulgario „Bulgara Esperantisto” estas abonebla per la poŝto

En ĉiuj socialismaj landoj — per la koncerna poŝto. Por aliaj landoj — pere de UEA aŭ per niaj perantoj

Estas organizita regula registrado de la revuo sur magnetofonbendo por la bezonoj de la blindaj esperantistoj

Estimataj Legantoj



En viaj manoj estas la laŭvica signifa provo por plibonigo de revuo „Bulgara Esperantisto”. Nun mi ne emas tedi vin per babilado pri malfacilaĵoj de la redakta skipo kaj pri dumlaboraj duboj koncerne la finan rezulton. Sed mi volus kredigi al vi, ke ni verkis, redaktis, kolektis publikigendaĵojn, solvis multajn teknikajn problemojn — kaj ĉion ĉi ni faris kun la deziro, ke vi havu kaj legu vere interesan revuon.

Ni redakcianoj bone konscias, ke nia legantaro estas sufiĉe bunta laŭ aĝo, interesoj, profesio, vivkonceptoj, gustoj kaj ĉiu devas trovi sian legajon. Krome, multaj el niaj abonantoj estas eksterlandanoj, kiuj interesiĝas ne nur pri Esperanto kaj ĝia movado, sed per la Internacia Lingvo ili ŝatus laŭeble pli vaste informiĝi pri Bulgario — pri ĝia kultura kaj politika vivo, pri la sociaj procesoj en nia lando. Ni strebas kontentigi ĉiujn, sed tio ne estas ebla sen via konstanta helpo — per opinioj kaj aktiva kunlaborado. Ni atendas ne nur viajn impresojn, sed ankaŭ informojn, artikolojn, rakontojn pri via propra E-sperto aŭ tiu de via societo, klubo ktp. Ne hezitu sendi viajn kontribuojn, ĉar viaj demandoj, problemoj, proponoj eble emocios ankaŭ aliajn esperantistojn. Ne forgesu, ke la varia enhavo de nia revuo dependas ankaŭ de vi!

(Daŭrigo sur paĝo 2)



Jaro 57

N-ro 9

Bulgara Esperantisto

**ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO, FONDITA EN 1919,
DISTINGITA PER ORDENO „KIRIL I METODIJ“ — I GRADO**

ĈU KUN LA SAMAJ PROBLEMOJ?...

Esperanto-instruado ĉiam estis kaj estos ĉefa agado en nia movado. Ĉiu E-asocio, celante plifirmigi la poziciojn de Esperanto, aparte zorgas reteni homojn, kiuj lernis la lingvon, certigi taŭgajn lernilojn kaj spertajn instruantojn, des pli nun, kiam komenciĝis la reorganiza periodo de BEA. Jam monatojn oni klopodas trovi la plej konvenajn formojn por sukcesigi la instrulaboron. Progreso tamen estas, iam malrapida, tamen progreso.

Multnombraj statistikoj atentigas pri maljuniĝo de la Esperanto-movado internaciskale. Pro tio niaj streboj direktiĝis ĉefe al junaj homoj. Inter la plej signifaj sukcesoj de BEA estas la kunlaboro kun la Ministerio pri Scienco, Kulturo kaj Klerigado. Al la jam aprobita fakultativa instruado de Esperanto en la mezaj lernejoj kaj kiel deviga studobjekto en du sofiaj lernejoj, ni povas aldoni kiel nian gravan

atingon la aprobon de Esperanto-metodikistoj en la lando. Alia bona rezulto dum la pasinta periodo estas la akcepto de Esperanto kiel fako en la Supera Pedagogia Instituto en urbo Blagoevgrad. La certa intereso, kiun montris la koncernaj institucioj, parolas pri ties konvinkigo rilate la utilicon de la lingvo kaj ĝian aplikadon.

Evidente la manieroj de lingvopopularigo estas trafaj. Entute estas jam forlasita la malutila praktiko anonci Esperanton kiel treege facilan lingvon, kiun oni povus ellerni en kelkaj monatoj. Multe pli konvinka estas la argumento, ke Esperanto estas relative pli facila ol ĉiu ajn nacia lingvo. Ĉio ĉi tamen gravas nur dum ni klopodas provoki intereson ĉe nesciantoj al la lingvo. Multe pli malfacile tamen estas gajni por la movado la homojn, kiuj komencis lerni la lingvon, ĉar la bonaj argumentoj, kiuj en la komenco estis nur en la sfero de teorio, poste

devas trovi por ili sian praktikan aplikadon.

Alia grava momento estas la perfektigo en la lingvoposedo. La taŭgeco de la vaste uzata trigrada sistemo de instruado jam delonge estas pruvita. La sekvaj du kursoj post la komenco estas malfacile organizeblaj, sed treege gravaj por la firmigo de la E-movado. Lastatempe en nia lando dum unu lernojaro estas aĉetataj inter 4000 kaj 6000 lernolibroj por komenco kurso, proksimume 300 lernolibroj por progresiga kurso kaj ĉirkaŭ 100 lernolibroj por la supera kurso. Ni jam devas liberiĝi de la tiel nomataj eternaj komencantoj. Ili nek povas argumentite popularigi la lingvon, nek okupiĝi pri rezultodona organiza laboro, aŭ gvidi kursojn. Ili fakte eĉ malhelpas nian laboron, anstataŭ fari ion utilan.

Pri la uzataj lernolibroj kaj aliaj instruhelpiloj oni multe parolis kaj disputis. La nun ekzistantaj en nia lando havas multajn pozitivajn flankojn, kaj ankaŭ malperfektaĵojn. Estas sciite, ke verkado de lernolibro postulas longan persistan laboron, kaj tute ne estas multaj la homoj, kiuj kapablas fari tion.

Inter la tiklaj problemoj estas ankaŭ la preparo de bonaj plenrajtaj

Esperanto-instruantoj. Ĉe ni ili estas tri specoj — profesiaj instruistoj-filologoj, profesiaj instruistoj kun nelingva fako kaj aliaj profesiuloj sen pedagogia fako. Dum sia perfektigo en Esperanto ili havas diversajn problemojn, kiuj tamen iel solviĝas. En la momento ĉe ni estas organizata nur unu instrurajta kurso, kiu ne avantaĝigas iun el la tri specoj de fakuloj. Krome, ĉiu instruisto de fremda lingvo tre bone scias, ke sen konstanta perfektigo en la koncerna lingvo ne povas subteni la necesan nivelon de instruado. Tio gravas ankaŭ por Esperanto-lektoroj.

Ĉe la sojlo de la nova lernojaro oni povas paroli pri bonaj rezultoj kaj ankaŭ pri solvendaj problemoj. Sen ili progreso ne povas esti. Iujn el la plej gravaj la novelektita Komisiono pri Instrua kaj Scienca Agado ĉe BEA jam solvis helpe de la instruagantoj el la tuta lando. Ni tamen persistu! La elektita de ni vojo estas ĝusta kaj niaj klopodoj ne devas ĉesi.

Al la organizantoj de la nova Esperanto-lernojaro — sukcesan laboron!

Nedka VALJAVIČARSKA — sekretario de la Komisiono pri Instrua kaj Scienca Agado ĉe BEA

**Estimataj
Legantoj**



En sia laboro la redakta kolektivo strebas konservi la valorajn tradiciojn, kiujn la praktiko konfirmis dum la preskaŭ 70-jara ekzistado de „Bulgara Esperantisto“. Sed en la bulgaran esperantistan movadon kaj en la redakcion mem, dank' al la renoviga proceso en nia lando, enverŝiĝis juna sango kaj ni multe esperas pri ĝia vivkapableco.

tista Asocio pro la konstantaj komprenemo kaj helpo, al la membroj de la redakta komitato pro ilia kunlaborado kaj al niaj korespondantoj, kunlaborantoj, perantoj kaj amikoj. En la nomo de la redakta skipo mi kore bondeziras al ĉiuj firman anon kaj longan komunan vojon tra la verda kampo de Esperantujo!

Fine mi sincere deziras danki al la Centra Estraro de Bulgara Esperan-

**Maria JANKOVA,
ĉefredaktoro de „Bulgara
Esperantisto“**

EDMOND PRIVAT

Se iam oni konstruos panteonon de meritplenaj esperantistoj, en ĝi nepre devas esti ankaŭ Edmond Privat, kiu faris multon por glorigi nian movadon. Sub liaj zorgoj dum jaroj kreskis kaj progresis UEA.

Li naskiĝis la 17-an de aŭgusto 1889 en Ĝenevo, fama urbo ĉe la suda fino de la Lemana Lago. Li lernis Esperanton dum siaj infanjaroj. En 1903 kune kun sia amiko Hektor Hodler li fondis gazeton „Juna Esperantisto“, unue eldonata de Ĝeneva Esperanto-grupo, sed poste ĝi fariĝis internacia ligilo de diverslandaj esperantistoj. Ĝi aperadis litografita, kun presita kovrilo kaj kun ilustraĵoj. La gazeto ricevis firman fundamenton, kiam en januaro 1906 la Presa Esperantista Societo en Parizo prenis sur sin la eldonadon. „Juna Esperantisto“ aperadis ĝis la komenco de la Unua Mondmilito.

Kiel 16-jara junulo Edmond partoprenis la unuan Esperanto-kongreson en 1905, en Boulogne-sur-Mer, Francio. Ne havante rimedojn por veturo, li pilgrimis la kongresurbon kaj konatiĝis kun la aŭtoro de Esperanto kaj kun multaj esperantistoj el diversaj landoj. Li interesiĝis pri diversaj eroj de la tagordo. Dum unu kunsido li parolis pri propagando inter junularo kaj kiel enkonduki Esperanton en la programon de la lernejoj. En alia ejo okazis kritikoj kaj klarigoj de Zamenhof pri la prononcado. Partoprenis ankaŭ Edmond. Dum la koncerto kun deklamoj de diversnaciuloj la juna sviso faris grandan impreson per sia natura talento paroli elokvente.

Fininte la liceon li estis akceptita en la Pariza universitato, kie studis lingvosciencoj kaj historion. Li verkis en franca lingvo libron pri psikologio de la popoloj.

Dum 1907—1908 Privat vizitis esperantajn grupojn en Usono, Anglio kaj Francio

kaj ĉie faris propagandparoladojn pri Esperanto. Pli poste li vizitis Ruslandon, kie konatiĝis kun multaj adeptoj de la Lingvo Internacia. Revenante el Ruslando li gastis al esperantistoj de MEZ-Eŭropo. Pli ol monaton li restadis en Hungario.

Kiel soci-aganto Privat laboris multflane. Li agadis por popolklerigado kaj organizado de kooperativa movado. Li subtenis la aferon de la subpremitaj nacioj, prezidis diversajn komitatojn kaj konferencojn, celantaj sendependigon de la subpremitaj popoloj.

Tamen eĉ por momento li ne forlasis la Esperanto-movadon. De 1921 ĝia 1928 li dediĉis sin al la internacia movado: dum 1923 li estis prezidanto de Internacia Centra Komitato, kiu organizis kunlaboron kun la lokaj kongresaj komitatoj ĉiujn universalajn kongresojn. Dum 1925 li estis prezidanto de UEA kaj de la Svisa Societo Esperanta. Li estis iniciatinto de la Somera Universitato — la unua okazis en Ĝenevo 1925. Li inde prezentis Esperanton al la Ligo de Nacioj, al la Internacia Laboroficejo kaj al la Universala Telegrafa Unuiĝo.

En la nomo de UEA li aranĝis kelkajn internaciajn konferencojn: Edukado — Ĝenevo 1922; Komercio — Venecio 1923; Radio — Ĝenevo 1924; Paco per lernejoj — Prago 1927. Ĉiuj ĉi aranĝoj distingiĝis per absoluta seriozeco kaj kompetenteco. Li sorĉis la partoprenantojn per sia kristale pura elparolo kaj facile komprenebla pensperado.

E. Privat trovis tempon por ĉio. De 1920 ĝis 1934 li estis redaktoro de la monata gazeto „*Esperanto*“, oficiala organo de UEA. Li fidele sekvis la tradicion de la revuo kaj klopodis fari el ĝi tribuno de plej noblaj ideoj. Li ne permesis, ke la revuo estu senkolora, oficiala komunikilo, sed aldonis al ĝi literaturan karakteron, cedante paĝojn al

beletristoj. Li rilatis atente al la junaj aŭtoroj. Tion mi scias el propra sperto. Kiel 20-jara junulo mi sendis al li du rakontojn kaj tamen mi ne tre kredis, ke la redakcio priatentos ilin. Kiam komence de 1929 mi vidis ilin presitaj en „Esperanto“, mi kvazaŭ ricevis flugilojn.

Ankaŭ lia pedagogia agado meritas mencion. Dum 1908 aperis liaj du lernolibroj por francoj. En 1911 aperis la populara rektmetoda „Kursa lernolibro“ kaj lia lingvistika ĉefverko „Esprimoj de sentoj en Esperanto“ — mikroskopa kaj sprita analizo de nia lingvo uzata en la vivo, precipe serĉante la esprimmanierojn pri sentoj.

Edmond Privat estas la unua historiisto de la Esperanto-movado. En la „Historio de

Esperanto“ (en du volumoj) kaj en lia „Vivo de Zamenhof“ ni havas detalan kaj samtempe poezian rakonton pri realaj eventoj.

Privat estis multflanka talento. Li lasis al ni la versan dramon „Ginevra“, versojn „Tra l' silento“, per kiuj li prezentas sin mildvoja, delikatsenta poeto. Li eldonis la popularan legolibron „Karlo“ kaj eseon pri Esperanta literaturo. Li skribis kaj verkis en stilo, kiu estas melodio, ritmo kaj koloro. Ĉefa trajto de lia stilo estas klareco. La hungara verkisto F. Szilagyi skribis pri li: „Kion ajn li verkas, la frazoj vivas, ni rekonas ĉiujn kolorojn de la vera vivo...“

E. Privat forpasis en 1922 jaro.

Hristo GOROV

Edmond PRIVAT

LA TEMPO

*De l' tempo vokite la vent' en aŭtuno
L' arbaron trasiblas betulojn klinante,
Kaj orajn foliojn ebriajn de suno
kun revoj plej kaj forblovas konstante.*

*Forkuras la tempo, forflugas senfine
neniam trafante l'estonton celatan.
Ĝi vivon la nian fortrenas obstine
Kaj ŝovas nin kvazaŭ ŝafaron pelatan.*

*Se restis sur voj' memorajo tre kara
kaj provas ni posten rigardi kun ploro,
Nin premas en koro l' amaso homara,
Kaj vento forvipas vidaĵon de l' koro.*

*„Rapidu!“ al tempo junulo jen diras.
„Ekhaltu!“ jen preĝas avulo dolore.
Al tag' hieraŭa ĉi tiu sopiras,
Dum tiu morgaŭon alvokas tutkore.*

*Sed ridas la tempo pri homaj deziroj
Kaj iras senzorge, la branĉojn faligas,
La kapojn blankigas kaj malgraŭ sopiroj,
La trunkojn al morto silente kurbigas.*

*Kelkfoje revulo, rutinon lacega,
L' amason kurantan forlasas tagfine
Kaj monton surrampas, dum suno ruĝega
La nubojn per oro vualas musline.*

*Kaj kantas poeto... kaj lian kantaĵon
Al homoj malsupren la vento forprenas:
Sed baldaŭ la tempo ĉielan vidaĵon
Forkaŝas kaj lin al kurado retrenas.*

*Ĝis morto nin ŝovas la tempo guverne.
Ĉar, malgraŭ turmento kaj spite etero
Nin logas la tempo kaj regos eterne
Svingante la flagon de homa espero.*

LASTA KISO

*Vi kien flugas, papilio,
Tremante kaj rapide?
Jam mortis rozo kaj lilio
Kaj venas frost' perfide.*

*Flugiloj viaj kvazaŭ lampo
Briletas en nebulo.
Vi kion serĉas tra la kampo,
perdita somerulo?*

*Dezertaj estas la ĝardenoj.
tra kiuj vagis amo via.
Skeletoj ŝajnas la vervenoj
sub verkro senfolia.*

*Vi kial flugas en malvarmo
Tra flora la tombejo?
Sur ĉiu loko pluva larĉo
Nun restas en herbejo.*

*Silentas ĉiuj en la nestoj
Kaj svenis bonodoroj
Jam ne batalos vi kun vespoj
Pri la proletaj koroj*

*Jen restas nur en kampo vasta
Velkinta kuzantemo
Sur kiu kiso via lasta
Mortigos vin en tremo*

POEZIAJ MOMENTOJ ĈE LA PIEDO DE LA BALKANO

Dum la lastaj tagoj de majo urbo Vraca buntas festkoloro. La tradiciaj Botev-tagoj altiras ĉi tien, ĉe la piedo de la ribela Balkano, multajn bulgarojn, junajn kaj maljunajn, el diversaj landregionoj. Ili venas por kliniĝi antaŭ la heroaĵo de la senmorta poeto Ĥristo Botev, antaŭ la memoro de miloj da batalantoj por libero.

Omaĝe al la pereintaj por libero herooj ĉiujare en Vraca okazas la tradicia Konkurso-Recitalo de Boteva kaj Bulgara Revolucia Poezio, inkluzive en Esperanto, organizata de la Komitato pri Kulturo, Centra Komitato de Komsomolo, Supera Teatra Instituto „Krâstju Sarafov” — Sofio, la Boteva Organizacia Komitato — Vraca, kaj Bulgara Esperantista Asocio. Ne hazardo tiu konkurso ĝuas bonan reputacion inter la esperantistoj en nia lando. La ĉi-jara, 8-a laŭvice superis la atendojn. Ĝin partoprenis ĉirkaŭ 200 personoj, gastis esperantistoj el Hungario kaj GDR. Specialan meriton pri la bona preparo de tiu festivalo havis la dommastroj — la esperantistoj el societo „Sukceso”, Vraca. Ili kreis mirindan etoson, la gastoj sentis sin inter amikoj.

La ĉi-jara konkurso-recitalo pasis en soleca atmosfero. Ĝi okazis en la granda kaj bela salono de la plej grava entrepreno en la urbo — la Hemia Teknologia Kombinato. La kombinata kolektivo konstante helpas la esperantistojn en Vraca kaj nun, por tiu soleca okazo, proponis al ili senpage sian salanon. La ĝenerala direktoro de la Hemia Teknologia Kombinato persone ĉeestis la Konkurson-recitalon.



Laŭ la statuto, la konkurson partoprenis individuaj kaj grupaj plenumantoj. Kvankam la ĵurio havis al ili certajn rimarkojn, la spektantoj tamen ĝuis viglan kaj belan artprogramon. Multaj el la recitantoj plibonigis sian lingvan kaj aktoran nivelon. Larĝiĝis la rondo de prezentitaj aŭtoroj.

Estas bone, ke preskaŭ ĉiuj partoprenantoj en la Konkurso estis junuloj. La poezio de Botev estas komunhomara kaj la fakto, ke ĝi sonas en Esperanto havas simbolan signifon. En nia lando la versaĵojn de Botev deklamas ĉiuj generacioj, sed la bulgara junularo elkreskas kun tiu senmorta kaj sankta poezio.

Unu sukcesa konkurso-recitalo de Boteva kaj Revolucia poezio estas jam historio. Ĝis la sekvonta!

Atanas ILKOV

Premiitoj de la VIII Konkurso-Recitalo de Boteva kaj Revolucia Poezio

GRANDA PREMIO — grupo „Verda Stelo”, kun arta gvidanto Jaĉo Jaĉev — IV lernejo (Sofio)

UNUA PREMIO: Silvija Karĉeva (Miĥajlovgrad),
Tanja Simeonova (Vraca)

DUA PREMIO: Deklama grupo (Čepelare), Deklama grupo (Stara Zagora), Grigor Venelinov (Miĥajlovgrad), Daniela Denčeva (Sofio)

TRIA PREMIO — Velička Vodeničarova (Velingrad)

PREMIO de CE de BEA: Deklama grupo (Jambol), Infana ĥoro (Vraca). Nastenka Dimitrova (Blagoevgrad).

PREMIO de la Komunuma Komitato de Patrolanda Fronto (Vraca): Teatra grupo (Ŝumen), Konstantin Pavlov (Sofio), Marijana Dikova (Bjala Slatina), Conka Stojanova (Sofio)

PREMIO de la Komunuma Komitato por Defendo de la Paco — Vraca, por eksterlandaj partoprenantoj) Lotar Muler (GDR), Regina Kün (GDR), Monika Cetej (Hungario), Gabriela Bozaj (Hungario)

PREMIO de la Teknologia Kemia Kombinato — Vraca: Stefka Dimitrova (Pavlakeni), Deklama grupo (Dimitrovgrad), Deklama grupo (Pleven); Deklama grupo (86-a lernejo — Sofio).

PREMIO de E-societo „Sukceso” — Vraca: Gergana Miĥajlova (Sofio), Deklama grupo (Blagoevgrad), Infana ĥoro (Miĥajlovgrad)

PREMIO de revuo „Bulgara Esperantisto” (senpaga abono por unu jaro): Plamenka Cvetanova (Vraca), Ilijana Petkova (Stara Zagora), Katja Ignatova (Velingrad), Reni Atanasova (Pleven); Stojan Bliznaški (Sofio)

PREMIO de revuo „Paco” — (Senpaga abono por unu jaro): Geno Vučkov (Dimitrovgrad), Todorka Angelova (Ŝumen), Valentina Dakova (Bjala Slatina), Vesela Bošnjakova (Elin pelin), Gergana Bončeva (Rakitovo).

JURIO

Prezidanto: Kunčo Válev

Membroj: Ivan Čulev, Vanja Dakovska, Ljubomir Trifončovski, k. t. sc. Kiril Velkov, Stojan Pavunčev, Snejinka Angelova.

Nia partopreno en la

INTERNACIA EKSPOZICIO-FOIRO DE LA LIBRO – SOFIO'88

Bulgara Esperantista Asocio jam por tria fojo partoprenis en la Internacia Ekspozicio-Foiro de la Libro — Sofio'88, okazinta la 2-an—7-an de junio k. j. Ankaŭ ĉi-foje la Ekspozicio-Foiro pasis sub la devizo „La libro — en servo al paco kaj progreso”, kiu unuigas la strebojn de ĉiuj landaj-partoprenantoj al konservado de la monda paco.

La Internacia Ekspozicio-Foiro de la Libro, kiu okazis por 18-a fojo jam akiris aŭtoritatan lokon inter la librofoiroj en la mondo. Ĝi senĉese plivastigas siajn geografiajn limojn. Ĉi-jare unuafoje en ĝi partoprenis Brazilo, Urugvajo kaj Venezuelo, kaj ankaŭ multaj firmaoj el Britio, Hindio, FRG, Francio k. a. Entute partoprenis 44 landoj, 129 firmaoj, pli ol 1100 eldonejoj, kelkaj internaciaj organizaĵoj, inter kiuj unuafoje la Konsilio pri Ekonomia Interhelpo, UNESKO, la Organizaĵo por Liberigo de Palestino. Estis eksponitaj ĉirkaŭ 40 000 diversspecaj eldonoj — de la popularaj belliteraturaj ĝis sciencaj verkoj, de la klasika formo de libroj ĝis ties vivo en la komputiloj. Tamen la plimulto de eksponaĵoj estis scienc-teknikaj eldonoj. La Ekspozicion-Foiron vizitis pli ol 100 000 personoj.

En la librostando de BEA gravan lokon okupis la broŝuro „Za preustrojstvoto na BES” (Pri la

renovigo de BEA) de Sava Dálbokov kaj la laste aperintaj en nia lando E-libroj „Amo mia” de Hristo Radevski, „Tango” de Georgi Karaslavov, „Ruza Petro” de Sava Popov, „Esperantista kontribuo por amikeco kun Sovetunio” de Josif Portnoj kaj gramofondisko kun la originala dramo en Esperanto „Ni vivos!” de Julian Modest. Krom ili estis eksponitaj ankaŭ ĉiuj plej valoraj Esperantaj libroj kaj gramofondiskoj, aperintaj ĝis nun en Bulgario. Oni povis vidi ankaŭ iujn eksterlandajn E-eldonojn. Vaste estis prezentitaj E-periodaĵoj, kiuj aperas en Bulgario: „Bulgara Esperantisto”, „Informacia Esperanto”, „Paco”, „Pacaktivulo” k. a. Senpaga oni proponis al la vizitantoj la koloran E-prospekton „Pri via restado en Bulgario” kaj programkajerojn de la Internacia E-Kursejo — Sofio.

Georgi Jordanov — ministro de kulturo, scienco kaj klerigado, kaj prezidanto de la Nacia Preparkomitato de la XVIII Internacia Ekspozicio-Foiro de la Libro — Sofia'88, post ties solena malfermo vizitis la librostandon de BEA, kun intereso trarigardis ĝin kaj notis en la Memrolibro: „Kun sinceraj bondeziroj. Georgi Jordanov”.

Evgeni GEORGIEV

INSTRUISTO-ESPERANTISTO



En la monatoj majo kaj junio de 1911 la juna entuziasma instruisto Ivan Draganov partoprenis la unuan kurson de Esperanto en Gabrovo, gvidatan de la instruisto-jurnalisto Dimităr Malčev. Li partoprenis ankaŭ la fondon de la unua urba esperantista societo „Semo” en septembro de la sama jaro kaj estis elektita prezidanto de ĝia kontrola komisiono.

Ivan Draganov aktivis en la Gabrova E-societo, helpadis gvidantojn de E-kursoj, propagandis Esperanton inter siaj kolegoj kaj inter la civitanoj. Li estis bona amiko de la unua prezidanto de la societo Vasil Tabakov, de la instruistoj-esperantistoj Ĥristo Gatev kaj Ĥristo Avramov, de la esperantistoj-aktivuloj Jurdan Sutrinkov kaj Vasil Popov.

Post 1938 Draganov pro malsano retiriĝis de aktiva laboro en la esperantista societo, sed li ĉiam interesiĝis pri la societa vivo. Li instruis Esperanton al siaj filinoj kaj en ilia hejmo ofte aŭdiĝis esperanta parolado. Li ricevis esperantajn revuojn, kiujn vespere ili legadis kune. Draganov korespondadis kun kelkaj alilandaj esperantistoj kaj en lia domo estis vera festo la ricevo de letero de korespondanto.

Ivan Draganov estas naskita en 1874 en urbo Kalof-er, situanta en la Roza Valo. Lia patro Genko Bozukov estis unu el la kurieroj dum la Aprila Ribelo en 1876 kaj estis bruligita de la turkoj en unu pajlejo. Dum la liberiga rusa-turka milito en 1877,

kiam la turkoj atakis kaj bruligis Kalof-er, lia patrino kun siaj ses infanoj, kune kun aliaj samurbanoj, forkuris trans la Balkanon en Gabrovo.

En Gabrovo Ivan estis adoptita de la malriĉa ŝuista familio Dragan kaj Cona Ivanovi. Laborinte kelkajn jarojn en la ŝuejo, li petis de sia adopta patro permeson kaj helpon por lerni en la pedagogia lernejo en urbo Kazanlâk, kaj la patro helpis lin. Post sukcesa fino de la pedagogia lernejo Ivan estiĝis instruisto en unu elementa lernejo de Gabrovo.

Ekkoninte de la infanaĝo la suferadon kaj la mizeron, li unua en la urbo jam en 1902 malfermas senpagajn dimanĉajn kaj vesperajn kursojn por senaboculoj — laboristoj kaj metilernantoj.

Ivan Draganov ĉiam aplikis la plej progresemajn metodojn en la instruado kaj edukado. Liaj iamaj lernantoj, nun jam maljunuloj, kun amo kaj tenero rememoras lin, liajn konsilojn kaj la kantojn, kiujn li ludis per violono dum la lecionoj de kanto.

En sia malgranda bieno apud vilaĝo Bakojci, li konatigis la vilaĝanojn kaj siajn lernantojn kun la lastaj novaĵoj kaj postuloj de la agromonia scienco.

Li forpasis la 18-an de oktobro 1947, plenuminte sian instruistan kaj socian devon, kiel prezidanto de la lerneja gvidkomitato kaj ankaŭ kiel aktiva agitante por Esperanto, pri kies bela estonto li kredis.

Bojana PRODANOVA

Pri L. L. Zamenhof kaj Litovio

En n-ro 4 de „Bulgara Esperantisto“ (1988) sur p. 2—3, mi legis artikolon „Zamenhof kaj Litovio“ de J. Petrulis (represita el „Horizonto de Soveta Litovio“, 1979). Estas bona afero serĉi kaj vastigi informojn pri la vivo kaj agado de D-ro Lazaro-Ludoviko Zamenhof (1859—1917). Provizore inter tiuj estas malĝustaĵoj. Tio estas normala, ĉar la procezo de malkovro, registrado kaj klarigo de pluraj detaloj el la biografio de Zamenhof plue daŭras preciziĝi. Kompreneble nur en publika diskuto, iom post iom, oni venos finfine al sendubaj faktoj, kiuj nepre forigos la ŝajnon, falsajon, erarojn, kaj mankojn.

1. Ĉu Zamenhof posedis litovan lingvon? Ĉiuj esploristoj okupiĝintaj pri la biografio de Zamenhof asertas, ke tiu ne lernis kaj ne posedis litovan lingvon. (a) *Edmond Privat*, unua lia biografo, konis Zamenhofon ekde 1905, parolis kun li dum ĉiuj universalaj kongresoj de Esperanto en la periodo 1905—1913. Krom tio, Privat veturis plurfoje al Varsovio, gastis ĉe Zamenhof, sed li nenion mencias pri posedo de litova lingvo fare de la iniciatoro de Esperanto. En 1920 aperis la „Vivo de Zamenhof“, poste plurfoje reeldonita. (b) *A. Poška* enketis en vilaĝo Vejseje (nun urbo) en 1925, sed neniu el la maljunuloj, kun kiuj Zamenhof interparolis en 1885 konfirmis, ke tiu parolis litovan lingvon. (c) *A. Dambrauskas* (Dombrovski) gastis ĉe Zamenhof en 1912 kaj diras, ke tiu sciis litovlingve nur saluti kaj diri proverbojn. (ĉ) *Adolf Holzhaus*, vaste informita, disponigis al la esperantistaro specialan ĉapitron en sia ĉefverko „Doktoro kaj Lingvo Esperanto“ (1969) pri la posedo de lingvoj fare de Zamenhof. Lia fina konkludo estas, ke Zamenhof konis „kelkajn litovajn vortojn, frazojn, proverbojn, sed la lingvon mem li ne sciis“ (p. 184—185). (d) *J. Petrulis*, surbaze de unuj kaj samaj argumentoj, akiritaj de li dum enketo en Vejseje (1958) asertas en 1959 (tuj post la enketo), ke Zamenhof interparolis en Vejseje (1885) en pola lingvo (kaj tio estas akceptebla). Sed tute subute en la artikolo de 1979 J. Petrulis defendas la tezon, ke Zamenhof interparolis en litova lingvo. Li tamen neniom klarigis kial li ŝanĝis sian antaŭan konkludon de 1959 (Heroldo de Esperanto, n-ro 6 (1284), de 1-a de aprilo 1959).

2. Kiam okazis la lasta stadio en pretigo de la Unua Libro? La tekstoj por la Unua Libro de Lingvo Internacia de D-ro Esperanto estis pretaj jam en la komenco de 1885. Zamenhof intense laboris en 1881—1884. Tre verŝajne en 1885 Zamenhof verkis sian belan poemon „Ho, Mia Kor!“

3. Kiam Zamenhof veturis per ĉevala ĉaro de Vejseje al Kovno (Kaunas) kaj returne? El Vejseje al Kovno Zamenhof veturis per ĉaro tirata de unuope jungita ĉevalo ne en 1887, sed du jarojn pli frue (en 1885). Dum unu el la pluraj ir-revenaj veturadoj li verkis aliajn poemojn en Esperanto.

4. Ĉu Aleksandro Zilbernik, la bopatro de Zamenhof estis komercisto? A. Zilbernik estis fabrikanto de sapo. Kune kun iu ruso li posedis saplaborejon dum 47 jaroj (1859—1906). Eble la kunposedantoj de saplaborejo havis ankaŭ specialigitan magazeno por vendi proprefaritan sapon.

„En fora lando mi ankaŭ havas amikon...“



Por unua fojo la ĉina esperantisto Tien Ŭej surpaŝis la teron de la Malnova Kontinento. Por unua fojo li konatiĝas kun Eŭropo, kun ĝiaj naturo, historio, kulturo, popoloj, kutimoj, manĝaĵoj... Por li ni — eŭropanoj, estas tiom strangaj kaj similaj unu al la alia, kiom por ni estas la ĉinaj hieroglifoj.

Sed kiajn miraklojn ne faras Esperanto! Antaŭ kelkaj minutoj ni estis tute nekonataj — homoj de du diversaj mondoj, kaj nun — dum la inaŭguro de lia ekspozicio en Sofio, ni kune trarigardas liajn pentraĵojn, parolas pri la ĉina pentroarto — malmulte konata en Bulgario. La aliaj ĉeestantoj en la ceremonio iomete envias, ĉar krom la bulgaraj esperantistoj — amikoj de la ĉino — pentristino Maja Gorova kaj skulptisto Bogomil Jivkov, kiu

ankaŭ partoprenas la ekspozicion per siaj verkoj, neniu alia povis sen tradukisto interŝanĝi eĉ unu vorton kun Tien Ŭej. Jam tiam — en la ekspozicia salono, mi ekinteresiĝis pri lia arto, kompetente prezentita dum la inaŭgura ceremonio de la bulgara artfakulino Bisera Josifova. Ŝi rakontis pri la nuntempa aspekto de la tradicia ĉina pentroarto „Go Hua“, kies reprezentanto estas Tien Ŭej: „Por la eŭropano neordinara, neimagebla estas la agadsfero kaj la profunda esenco de la ĉina pentristo — samtempe pensulo, filozofo, poeto, kaligrafo. Por ĉinoj pentraĵoj estas talentaj versoj kaj la versoj — veraj bildoj.“ La studentoj pri arto en Ĉinio lernas du jarojn kaligrafion por havi la rajton fari artismajn kopiojn de la grandaj originaloj el la pa-

sinteco... Se la eŭropaj pentristoj prezentas la vivon de la naturo per la homa vivo, la ĉinaj majstroj reproduktas la vivon de la homo per la vivo de la naturo. La filozofio de la ĉinaj pentristoj eble estas kaŝita en la penso „La sekreto de majstresco troviĝas ĉe la limo inter simileco kaj malsimileco kun la naturo. Superflua simileco estas vulgara, sed malsimileco estas pura mensogo.“

Post kelkaj tagoj, en nia redakcejo, mi denove parolis kun Tien Ŭej pri la specifaj trajtoj de la ĉina pentroarto.

Kiu fakte estas Tien Ŭej? 37-jara pentristo, dekano de Fakoj pri Arta Teknologio en la Universitato. Ĉun Ĉou en la 2-miliona ĉefurbo de la provinco Hanan Ĉan Ĉou. Li estas ankaŭ docento kaj vicprezidanto de la Ligo de Pentristoj en la urbo. Tien Ŭej finis la Akademion pri Arto en sia urbo kaj nun instruas desegnon en la universitato. Li estis afabla respondi al jenaj demandoj:

— *S-ro Tien, mi petas, rakontu iom pri via laboro*

— *Mi pentras sur speciala ĉina papero, kiu estas mola, maldika kaj oni povas ĝin facile akvumi. La ĉina pentroarto havas jenajn temojn: homoj, pejzaĝoj, floroj kaj bildoj. Mi elektis la duan. Por pentrado mi uzas ĉinajn farbojn, kiuj similas la eŭropajn akvofarbojn.*

En mia ekspozicio vi vidis klasikajn pejzaĝojn, pli modernajn bildojn — la naturo prezentita laŭ mia

vidpunkto, kaj ankaŭ kaligrafiaĵojn. La lastaj estas poemoj de famaj antikvaj poetoj.

— *Per la Internacia Lingvo ni havas eblecon konatiĝi kun via arto. Esperanto donas al vi popularecon, ĉu ne?*

— Ne nur tion! Ankaŭ eksterlandajn leteramikojn — el Pollando, Bulgario, Francio, Japanio kaj Aŭstralio. Mi ankaŭ konas esperantistojn el Sovetunio, Hungario, Ĉeĥoslovakio, Svedio, Svislando, Nederlando, Portugalio, Usono. Dank'al Esperanto mi jam vizitis, krom Bulgario ankaŭ Hungarion, Rumanion, Pollandon kaj Sovetunion.

Mi intencas viziti ankaŭ aliajn eŭropajn landojn kaj fine partopreni la Universalan Kongreson en Roterdamo.

En Bulgario pleje plaĉis al mi la malnovaj urboj Plovdiv kaj Veliko Tŕrnovo kaj mi dezirus venontjare reveni vian landon por pentri en ili... Mi vizitis ankaŭ la urbojn Popovo, kaj Opaka kaj vilaĝon Ĝuljunica. Impresis min la arĝentaj kaj oraj trezoroj en la Nacia Historia Muzeo. Mi konatiĝis kun pluraj bulgaraj pentristoj kaj mi konstatis, ke la bulgara arto estas altnivela. La bulgara popolo posedas altan estetikan senton. Tion pravas la skulptaĵoj, la modernaj konstruaĵoj. Mi rimarkis la originalan kombinon inter arkitekturo kaj monumenta ornamo. Plej

multe plaĉis al mi la Nacia Palaco de Kulturo „Ljudmila Jivkova“ kaj la Centra Sofia Stacidomo.

— *Kion povus ekscii niaj legantoj pri la esperantista movado en via loĝloko?*

— *Mi mem esperantistiĝis antaŭ sep jaroj. En nia urbo estas 300 esperantistoj. Krom kunvenoj ni organizas ekskursojn, renkontiĝojn kun esperantistoj el aliaj urboj. Ni eldonas la E-bultenon „Verda Urbo“ kaj*

kelkfoje dum la jaro oni faras esperantlingvajn radioelsendojn.

Fine, al la legantoj de „Bulgara Esperantisto“ — revuo, kiu ege plaĉas al mi, mi dediĉas kaligrafiaĵon el poemo de fama antikva ĉina poeto el la dinastio Tan, kies senco estas jena „En mia lando mi havas bonan amikon, en fora lando mi ankaŭ havas amikon, kiun mi sentas kiel najbaron“

M. BOJAĜIEVA

海內有知己
天涯若比鄰
sofio 田歲
27. V. 1988

AL LA BULGARAJ LEGANTOJ DE E-PERIODAĴOJ

Ĉiuj dezirantoj aboni revuojn „Paco“, „Budapeŝta Informilo“, „Juna Amiko“ kaj „Pola Esperantisto“ povas fari tion en ĉiu bulgara poŝtejo.

Per la kancelario de BEA estas aboneblaj „Esperantisto Slovaka“, kaj „Der Esperantist“.

Monumento en kiu eblos studi kaj krei

Laŭ la ideo unue lanĉita de s-ro Roman Malinowski, prezidanto de la pola parlamento, ekde la Jubilea Kongreso en Varsovio pasintjare oni konsideras starigon de Monda Esperanto-Centro „Zamenhof“ en Bjalistoko, la urbo en kiu naskiĝis la iniciatinto de la Internacia Lingvo en la jaro 1859. S-ro Malinowski invitis Universalan Esperanto-Asociacion esplori tiun ideon inter siaj membroj. Alvenis multaj proponoj rezulte de alvoko i. a. en la revuo „Esperanto“, kaj surbaze de ili kaj de diskutoj inter komitatanoj kaj estraranoj de la Asocio, estiĝis la ĉi-sekva laborodokumento pri la celoj kaj formo de la estonta Centro.

En Pollando mem, kaj aparte en Bjalistoko, jam regas kompleta entuziasmo pri la projekto (vd. p. 61 de la lasta numero): kreiĝis tie Fondajo Zamenhof, kiu gvidos la laborojn; estas pretaj ĝiaj statuto kaj jura registriĝo; okazis fine de februaro provizora kunsido de la estraro de tiu Fondajo; pretas la unuaj arkitekturaj skizoj; survojas la unua el la regulaj subvencioj de la pola Ministerio pri Kulturo...

Kiam, post deko da jaroj, la Centro ekfunkcios, ĝi fariĝos la plej grandioza monumento al Zamenhof. Ĝi ne estos marmora fridaĵo por admiri. Ĝi estos monumento, kiu pulsas kaj vivas, lernejo ĝi estos, studcentro, teatro, festivalejo, feriejo... ĝi estos tio, kion ni kapablos krei el ĝi. La ŝtato Pollando kaj la urbo Bjalistoko certe konstruos la Centron. Ni esperantistoj ricevos la konstruaĵojn kvazaŭ donace, por animi ilin, por spiri en ilin la vivon kaj tiun unikan internaciecon, kiun nur ni kapablas krei en la hodiaŭa mondo.

Reaĝoj al la sekva dokumento estas bonvenaj ĉe la prezidanto de UEA aŭ la revuo.

ORIENTIĜO

Celoj kaj publiko: La Centro servu apartajn grupojn, nome: 1) Tiuj, kiuj volas lerni Esperanton, perfektigi sian Esperanton aŭ instrui ĝin; 2) tiuj, kiuj volas studi esperantologion, interlingvistikon kaj internacian lingvan komunikadon; 3) tiuj, kiuj volas partopreni la Esperanto-kulturon; 4) tiuj, kiuj volas studi aŭ informiĝi pri Zamenhof kaj liaj tempoj; 5) tiuj, kiuj volas lerni pri pola kulturo.

Rimedoĵoj kaj programoj: La Centro kontentigu la jenajn bezonojn de tiuj kvin grupoj laŭ la jenaj vojoj:

1) **Lernado de Esperanto kaj formado de instruistoj.** Homoj en tiu grupo venos el Pollando kaj el eksterlando. Ili havos je sia dispono longdaŭrajn studprogramojn, laŭ la tradicia universitata formo, kaj ankaŭ mallongdaŭrajn studprogramojn, ekzemple dumsemajnfajnajn, somerajn ktp. Laŭeble la programoj estu ligitaj al ŝtataj rajtigoj, ekz. instruistaj rajtigoj. La Centro ankaŭ okazigos distancajn programojn, utiligantajn la elsendkapablojn de la radiostudio de la Centro kaj aliajn rimedojn.

2) **Studado de esperantologio, interlingvistiko kaj internacia lingva komunikado.** La Centro proponos longdaŭrajn kaj mallongdaŭran studprogramojn pri tiuj temoj. Ĝi proponos la eblecon de restado en la Centro por fari bibliotekajn esplorojn, kaj ĝi organizos konferencojn pri la koncernaj temoj.

3) **Esperanto-kulturo.** La Centro organizos festivalojn de la Esperanto-kulturo, kun partopreno de polaj kaj eksterlandaj artistoj, konferencojn pri temoj, kiuj rilatas al la Esperanto-kulturo, kaj renkontiĝojn de kulturaj gvidantoj de la Esperanto-movado.

4) **Studado kaj informiĝo pri Zamenhof.** La Centro ebligos la studadon de la epoko de Zamenhof per faciligo de aliro al urbaj kaj regionaj arkivoj, per bibliotekaj esploroj, per vizitado de muzeo pri tiu ĉi temo, kaj per konferencoj kaj festivaloj.

5) **Pola kulturo.** La centro ankaŭ ebligu studadon pri la polaj lingvo kaj kulturo, precipe por esperantistoj, sed ankaŭ por aliaj eksterlandanoj. Okazu mallongdaŭraj studprogramoj kaj lingvaj kursoj, precipe dumsomeraĵ.

FAKOJ KAJ STRUKTURO

1) **Esplorinstituto.** La kerno de la Centro estos fako kaj esplorinstituto pri la jenaj temoj: a) lingvaj aspektoj de internacia komunikado, inkluzive la novan mondan komunikatan ordon kaj internacian lingvan politikon, b) esperantologio kaj interlingvistiko, kun emfazo interalie je la praktika utiligo de Esperanto, c) Esperanto-pedagogio en la kunteksto de lingvo-pedagogio ĝenerale; d) moderna socia kaj kultura historio pola kaj bjalistoka. La Centro uzos la polan lingvon kaj Esperanton (kaj eventuale aliajn lingvojn laŭbezone). Ĝi donos diplomojn pri pedagogio kaj pri fakaj esploroj komunikaj kaj lingvistikaj. Ĝi okazigos longdaŭrajn kursarojn en ambaŭ lingvoj. Ĝi proponos mallongajn kursojn por poloj kaj eksterlandanoj. Ĝi havu propran eldonserion fakan, propran eldonejon por instruiloj kaj lerniloj, radian kaj televidan fakon por pretigo kaj elsendo de instruprogramoj. Ĝi eventuale servu kiel centro por formulado de pola nacia lingva politiko. Ĝi havu programon de interŝanĝo de profesoroj kaj studentoj kun eksterlandaj universitatoj.

2) **Biblioteko.** La Centro starigos laŭeble plej kompletan bibliotekon pri la kvar supre menciitaj fakoj. Tiu biblioteko kunlaboru ankaŭ kun lokaj kaj naciaj kolektoj kaj estu laŭeble ligita al aliaj grandaj Esperanto-bibliotekoj.

3) **Eldonejo.** Tiu aperigu la supremenciatan serion.

4) **Konferenca fako.** La fako organizas a) studkonferencojn kaj seminariojn pri aspektoj de la supremenciataj fakoj, b) turismajn renkontiĝojn, c) regionajn kulturajn renkontiĝojn, precipe Esperantajn, en kunlaboro kun la baltaj respublikoj kaj aliaj najbaraj ŝtatoj.

5) **Muzeo pri Zamenhof kaj liaj tempoj.** Tiu muzeo kovros kvar ĉefajn temojn: a) la vivo de Zamenhof kaj la frua Esperanto-movado, b) la urbo kaj regiono, c) grandaj sociaj kaj kulturaj fluroj de la epoko de Zamenhof, ĉ) la etna heredaĵo de Pollando kaj Bjalistoko, precipe la juda heredaĵo.

6) **Radia kaj televida fako.** Tiu fako pretigos studkaj instru-materialon, kaj eventuale povus esti ligita al naciaj elsendoretoj.

7) **Hotelo kaj studenta domo.** Tiu loko, kiu enhavu sportejoj, sideĉambrojn ktp, loĝigu la studentojn en la Centro kaj ankaŭ vizitantojn kaj patroprenantojn en specialaj aranĝoj.

8) *Teatra salono kaj kinejo*. Tiuj ejoj, utiligataj por festivaloj, kulturaj aranĝoj ktp. de la Centro, estos ankaŭ je la dispono de la loka publiko kiam la Centro ne uzos ilin.

9) *Klasĉambroj kaj oficejoj*.

10) *Fako pri regiona Esperanto-agado*. Ĉar la Centro funkcios kiel ligilo inter la esperantistoj el la tuta regiono, ĝi eventuale enhavu fakon pri regiona Esperanto-agado, kiu ligu interalie polajn kaj sovetiajn esperantistojn.

PLENUMO

1) *Oni petu kunlaboron de Unesko*, precipe pro la rolo de la Centro en studado de internacia lingva komunikado, interalie la lingva politiko. 2) Oni celu atingi *formalan rezolucion de Unesko*, kiu donu rekonon al la Centro kaj ĝia celo. 3) Oni utiligu la *volontulan helpon de eksterlandanoj-esperantistoj* en la konstruo de la Centro (laborbrigadoj en kombino kun

perfektigaj kursoj, ekzemple). 4) Okazu sistema klopodo ene de la Esperanto-movado informadi pri Bjalistoko, tiel ke la *Esperanto-movado kvazaŭ „adoptu” Bjalistokon* kaj ĝiaj historio, geografio kaj vivo fariĝu plene konataj al la esperantistoj; *la urbo mem esperantigu sin laŭeble*, per ŝildoj ankaŭ en Esperanto kaj per eldonaĵoj en Esperanto pri la urbo. Tiel oni kreos iom post iom merkaton por la konstruota centro. 5) *Oni kolektu monon* por la Centro ene de la Esperanto-movado kaj eventuale inter aliaj celgrupoj. Laŭeble, tiu monokolekto estu ligita al specifaj celoj, ekzemple stipendioj por eksterlandaj studentoj. 6) Oni okazigu *kunvenon pri la Centro* dum la Universala Kongreso en Roterdamo. 7) Oni starigu *konsilan komitaton* en la Esperanto-movado, aldone al la organiza komitato. Tiu konsila komitato konsistu el konataj kaj respektataj esperantistoj. 8) Laŭeble oni starigu *kunlaboron* kun la Asocio de Sovetaj Esperantistoj (ASE).

PROBLEMOJ DE LA INSTRUADO

La metodo de Andreo Cseh

(daŭrigo de n-ro 7—
8/1988)

**Kelkaj konsiloj de
Andreo Cseh al la
instruantoj**

1. La kursejo estu kiel eble plej komforta kaj agrabla, kun sufiĉe grandaj benkoj, bonaj lumo kaj hejto, por ke la malkomfortaĵoj ne ĝenu la atenton, tiom necesan dum la lecionoj. Tre grava estas la granda kaj bona nigra tabulo, ĉar lernolibroj ne estas uzataj kaj la sola fonto de la tekstoj estas la tabulo. La benkoj estu oportunaj por skribado.

2. La nombro de la kursa-

noj estu inter 20 kaj 40. Pli aŭ malpli alta nombro ne estas utila.

3. Ne imitu sklave, sed ŝanĝu, transformu la materialon laŭ la bezonoj, precipe laŭ la personeco, temperamento de la instruisto, laŭ la klereco kaj interesoj de la lernantoj kaj laŭ la lokaj cirkonstancoj. La skribita kursteksto ne estu kateniĝinta por vi, sed ekzemplo kaj konsilo, havu inventemon por ŝanĝi laŭ momentaj bezonoj.

4. Farante ŝanĝojn tamen atentu, ke la necesa ordo ne renversiĝu. La nuna ordo estas rezulto de longa spertado. Facilanima ŝanĝado en

la ordo de la gramatikaĵoj kaj vortoj povas sin venĝi kaŭzante malfacilaĵojn poste.

5. Sur la tabulon oni skribu elegante kaj klare, tre klare ĉar la lernantoj ja ne havas libron.

6. Koloran kreton uzu por atentigi pri novaj gramatikaĵoj (akuzativo, verbtempoj, sufiksoj).

7. En la kurso la plej grava estas la persono de la instruisto. Li povas sukcesigi la plej malbonan metodon kaj povas detrui la plej bonan. Tial klopodu regi vin kaj

vian laboron kaj fariĝu majstro en via fako.

8. Ne rapidu en la instruado. Tio tute ne helpas. Se ne restas sufiĉa tempo, prefere forlasu partojn, precipe el la lastaj partoj de la kursteksto. Aŭ forlasu negravajn rakontaĵojn.

9. Mia laboraĵo tute ne estas perfekta. Tial mi petas la ŝatatajn kolegojn, ke ili bonvolu kritiki kaj plibonigi kaj pri tio sciigi min. Kun dankemo mi akceptos iliajn proponojn, konsilojn.

10. En la lecionoj klarigu ĉion bone kaj plene laŭ la bezonoj. Ne kontentiĝu per la respondoj de la lernantoj „ni komprenas”. Lerta instruanto rimarkas, se tiu respondo ne estas sincera.

11. Ĉiam petu konsilojn de spertaj samideanoj ĉeestantaj viajn lecionojn.

12. Preparu vin bone al ĉiu leciono, por ke vi estu la materialon kaj la lernantaron.

13. Ne donu tro grandan materialon en unu leciono, ĉar la cerbo bezonas tempon por digesti, same kiel la stomako.

14. Dum la lecionoj parolu malrapide kaj tre klare. Haltu inter la frazpartoj, por ke la vortoj ne kunfluu. En la parolo oni ne povas vidi la distancojn inter la vortoj, kiel en la skribo. Per lerta kaj agrabla, sed ne tro aktoreca modulado de la voĉo por la enhavon de viaj diraĵoj.

15. Faru nur tiajn demandojn, je kiuj oni povas doni certan respondon. Postulu

ĉiam kompletan respondon, ne akceptu nur „jes” kaj „ne”. La celo de la metodo estas ĝuste la paroligo de la lernantoj. En la komenco de la kurstekstoj staras la plenaj respondoj, sed por ŝpari spacon, poste ili estas mallongigitaj. Sed en la kurso la lernantoj devas respondi ĉiam per kompleta frazo, ĝis la kursfino.

16. Por dumleciono uzado estas konsilinde fari mallongigitan ekstrakton el tiu ĉi kursteksto, por kontroli la sinsekvon de la partoj kaj malebligis forgesadon pri gravaĵoj.

17. Estas utile disdoni al la lernantoj presaĵojn, ekz. turismajn prospektojn kaj specimenojn de gazetoj, kiujn la kursgvidantoj povas facile akiri senpage. Tiaj donacetoj estas agrablaj por la lernantaro.

18. Komencu ĉiun lecionon per kelkaj demandoj, kiuj ripetas la materialon de la lasta leciono.

19. Decan bonhumoron, ŝercojn apliku inter pripensitajn limoj. Nobla gajeco origu vian laboron. Zorge evitu demandon aŭ aludon, kiu povus ofendi aŭ ĝeni iun. Faru vian laboron elegante por imponi.

20. Vivigu vian tutan laboron amo al Esperanto kaj amo al viaj lernantoj. Tiam vi brile sukcesos kaj miaj konsiloj estos superfluaĵ.

* * *

Mi sekvas strikte ĉi tiujn konsilojn, kaj se vi ankaŭ sekvos ilin, vi certe ne eraros! Ja neniu naskiĝis perfekta instruanto. Ankaŭ mi

eraras, kaj ĉar mi ne povas vidi miajn proprajn erarojn kaj mankojn, mi petas miajn lernantojn montri ilin. Tiucele, post 3—4 lecionoj, mi donas kelkajn demandojn al la lernantoj, nome:

1. Ĉu al vi plaĉas la metodo de instruado?

2. Ĉu vi ĉion komprenas?

3. Kion vi ne komprenas?

4. Kion vi proponas, por ke niaj lecionoj estiĝu pli interesaj?

Mi direktas al miaj gekursanoj specialan peton respondi tute sincere kaj ne lakone per „jes” kaj „ne”, sed detale kritiki mian laboron. Prefere oni skribu pri la mankoj kaj evitu „la „belajn, sed ne verajn” vortojn. Poste ni voĉlegas la plej interesajn respondojn. Mi estas treege danko al miaj gekursanoj, speciale al tiuj, kiuj montras miajn mankojn kaj helpas al mi plibonigi mian laboron.

Kiel mi jam diris, mi ne havas motivon plendi pri miaj gekursanoj, nek pri miaj rezultoj! Ofte okazas ĉe mi, ke en la komenco estas malpli da kursanoj, ol ĉe la fino. Mi ofte rememoras la gviditan de mi printempan kurson en la Supera Ekonomia Instituto „Dimităr Blagoev” en Varna. En la komenco enskribiĝis 65 gestudentoj kaj geurbanoj kaj ĉe la fino ilia nombro atingis la ciferon 107! La saman rezulton mi bondeziras ankaŭ al vi, karaj gekolegoj!. Mi estas ĉiam preta helpi al vi per leteroj aŭ praktike, se ĉe vi ekĝermis deziro uzi ĉi tiun metodon.



● Uzbeka Esperanto-Komisiono informas, ke la redakcio de revuo „Soveta Uzbekio” konsentis disponigi al la esperantistoj duonpaĝan rubrikon. Se estas intereso al tiu ĉi rubriko, ĝi povas esti pligrandigita.

Gratulleterojn kaj materialojn pri la rubriko oni sendadu al: „Soveta Uzbekistano”, Lenin-str. 41, SU—700 00 Taŝkento USSR.

● Luksan turisman broŝuron pri „Madrid kaj ĝia monumenta ĉirkaŭaĵo” eldonis Improtur-Sekretaria General de Turismo. La broŝuro enhavas 24 grandajn paĝojn, ilustritajn per koloraj bildoj kun mapoj de la ĉirkaŭaĵo, aŭtovojoj kaj plano de la madrida centro.

● La 24-paĝa katalogo de la Libroservo de Hispana Esperanto-Federacio ofertas al siaj klientoj multajn librojn, lernilojn k. a. esperantaĵojn.

● La rusa vorto „mir” havas du signifojn: mondo kaj paco. Tial estis malfacile per unu vorto traduki ĝin en la titolo „Mir i fantazia”, kiun havos konstanta internacia ekspozicio de infan-verkoj en Pionir-Palaco

de la granda industria urbo Ĉeljabinsk, USSR:

Iniciatintoj de tiu ekspozicio „La mondo, paco kaj fantazio” estas geknaboj el la klubo „Lertaj manoj”. Ili pretas reciproke interŝanĝi infan-laboraĵojn kun ĉiu klubo tutmonde, proponante pupojn, ludilojn, kudraĵojn, trikaĵojn, brod-, skutlpt-, desegn-, plektaĵojn... La ekspozicio bezonas la samon kaj, se eble, ceramikaĵojn, tapiŝetojn, gobelinojn ktp.

Jen la adreso: USSR 454 000 Ĉeljabinsk, Dvorec pionerov, Ankudinova T.

E-klubo ĉe tiu Pionir-Palaco pretas helpi traduke.

La iniciatintoj petas: esperantistoj, aperiĝu jenan anoncon en porinfanaj kaj pedagogiaj periodaĵoj nacilingve:

Lernejana E-klubo „Stelo de l'Espero” organizas perantan servon por infanoj, kiuj volas korespondi, trovi leteramikaĵojn en Sovet-Unio. Skribu pri viaj interesoj kaj deziroj (ne forgesu indiki aĝon). USSR 454 080 Ĉeljabinsk, Aloe pole, Dvorec pionerov, Esperanto.

ESPERANTO EN LA OLIMPIKON

Adamo Góralski, konata esperantisto kaj mecenato de la Movado, fine de la pasinta jaro komencis kampanjon por enkonduki Esperanton kiel helplingvon en la Olimpikajn Ludojn 1992, kiuj okazos en Barcelono. Tiucele li verkis konvinkigan leteron-artikolon kaj dissendis kopiojn de ĝi al ĉiuj gravaj gazetoj de Hispanujo, al la nacia Radio kaj Televido kaj al eminentaj personoj de la socia kaj politika vivo de la lando, i. a. al la Reĝo Juan Carlos, la Reĝino Sofia, ĉefministro Felipe Gonzales, Jorgi Pujol — prezidanto de Katalunio, la urbestro de Barcelono Pascual Maragay.

El „Heroldo de Esperanto”, n-ro 7/87

JUBILEA

KANTO

PRI

ESPERANTO

Teksto: Simeon SIMEONOV

Muziko: Dimităr TERZIEV

*Saluton, saluton, tutmonda homaro!
Salutas vin ni per la lingvo centjara —
la lingvo karega kaj internacia,
la lingvo komuna kaj jam tradicia
kaj unuiganta la homojn surtere.*

Refreno:

*Celebru ĝin (2) ni kun admir' (2)
celebru ĝin, ni kun admir',
celebru ĝin!*

La aŭtoro de la teksto Simeon Simeonov naskiĝis en urbo Lukovit la 2-an de julio 1899. Eminentula bulgara tradukisto kaj verkisto en Esperanto. Lia poezia verkaro — originala kaj traduka — ampleksas pli ol 400 verkojn.

La komponisto Dimităr Terziev naskiĝis la 16-an de marto 1923 en urbo Mičurin. Li finis la muzik-teorian fakon de Bulgara Ŝtata Konservatorio en Sofio. Horgvidanto de la Internacia Esperanto-Horo de 1980 kaj prezidanto de Internacia Muzika Esperanto-Ligo (MEL) de 1985. Li estas kreinto de multe da korusaj kantoj.

„Jubilea kanto pri Esperanto“ kiel ni jam informis niajn legantojn, gajnis la premion An-okin pri Kanto dum la pasintjaraj Belartaj Konkursoj.

Maestoso

mf

S Sa- lu- ton, sa- lu- ton, tut-

A

T *mf*

B Sa- lu- ton, sa- lu- ton, tut

P-no *mf*

f

mon- da ho- ma-ro! Sa- lu- tas vin ni per la lin- gvo cent- ja- ra

f

mon- da ho- ma-ro! Sa- lu- tas vin- ni per- la lin- gvo cent- ja- ra

f

gliss

Andante dolce

p

La lin- gvo ka- re- ga kai in- ter- na-

p

La lin- gvo ka- re- ga kai in- ter- na-

rit.

pp

ci- a,

sf kaj u- nu- i- gan- ta la

ci- a,

sf

dolce

p

La lin- gvo ko- mu- na kai jam tra- di- ci- a

sf

kaj u- nu- i- gan- ta la

p

sf

gua-

sf

Animato

ho moin sur-te-re. Ce-le-bru gin ni kun ad-mir',

ho mojn sur-te-re. ce-le-bru gin ni kun ad-mir',

ho-mojn sur-te-re. Ce-le-bru gin ni kun ad-mir',

celebrugin ni kun ad-mir',

ce-le-bru gin ni kun ad-mir', ce-le-bru gin!

ce-le-bru gin ni kun ad-mir', ce-le-bru gin!

rit.

25-jariĝo de Muzika Esperanto-Ligo



La Internacia Koruso, sub la gvidado de Dimitar Terziev, dum la 70-a UK en Augsburg 1985.

La fondita de Giovanni B. Briano en 1963 MUZIKA ESPERANTO-LIGO (MEL) ĉi-jare notas sian 25-jariĝon.

La celo de MEL laŭ la statuto estas: „Kunligi muzikistojn (profesiajn kaj amatorajn) kaj muzikamantojn pere de la Internacia Lingvo Esperanto, ankaŭ kontribui al multflanka kulturinterŝanĝo koncerne muzikon”.

La tutan trapasitan de MEL vojon oni povas dividi konsekvence en tri periodoj:

Dum la unua periodo — ekde ĝia fondiĝo en 1963 ĝis 1973 fervore laboris krom ĝia fondinto s-ro Briano, ankaŭ d-ro Mario Dazzini, kiel prezidanto de MEL, kaj Georg Christian, kiel sekretario de Terminara Komisiono (de 1970 ĝis la fino de sia vivo — 1975)

Dum la dua periodo — ekde 1974 ĝis 1982 (dum kiu prezidanto estis prof. d-ro Stojan Guĝev (Bulgario) kaj sekretario s-ro David Hill (Anglio), longtempa redaktoro de la bulteno „Muziko”, la tuta serio da bultenoj (1—21) aperantaj du-tri aŭ kvarfoje dum la jaro, registris ĉiujn gravajn eventojn de la muzika movado kaj povus servi kiel dokumentado de la laboro de MEL.

La tria periodo de MEL komenciĝas de 1982, kiam s-ro D. Hill pro diversaj cirkonstancoj ekŝiĝis de la sekretarieco kaj la membraro elektis novan sekretaron, s-ron Niklaus Weiss — svison. Li daŭrigis la noblan, sed malfacilan kaj respondecan laboron, ligitan kun la eldonado de la bulteno „Muziko”.

Per „Muziko” ni ekscias multe pri la muzika vivo en la Esperanto-movado; nome, unue oni devas mencii la MEL-agadon pri normigo de la muzika terminaro en Esperanto. Jam estas eldonita alfabeto indekso al la baza Muzika Terminaro de Butler kaj Merrick. La aŭtoro de la alfabeto indekso D. Hill skribas en sia letero: „... Mi esperas dum la venontaj monatoj iom denove okupiĝi pri la terminara kampo” (decembro 1987).

Gravan parton de la MEL-agado prezentas la Internacia Esperanto-Horo, kiu partoprenis la Universalajn Kongresojn en Stokholmo (1980), Antverpeno (1982), Budapeŝto (1983), Aŭgsburgo (1985), Varsovio (1987) kaj ĉi-jare en Roterdamo... La geĥoranoj estas individuaj anoj kaj la Horo — kolektiva ano de MEL.

La enketo inter muzikaj fakdelegitoj el la tuta mondo, kiun MEL-estraro faris pasintjare, pruvis la neceson de tio.

Al la jubileo de MEL estas dediĉita la libro „Esperanto kaj muziko“, kiu enhavas valorajn originalajn artikolojn pri Esperanto kaj muziko, skribitajn de mond-

famaj MEL-agantoj kaj muzikspertuloj.

MEL atingis jam maturan kaj fortan aĝon de 25 jaroj. Ni bondeziru al ĝi sukcesan estontan laboron!

Dimităr TERZIEV,
prezidanto de MEL

Poŝtista Sekcio ĉe BEA 20-jara

Por la Poŝtista Esperanto-Sekcio ĉe BEA la jaro 1988 estas jubilea, ĉar ĝuste antaŭ 20 jaroj, enkadre de la 37-a Nacia Kongreso de Bulgara Esperantista Asocio, okazinta en urbo Varna, ĝi estis fondita — kiel sekcio de laboruloj el la sfero de Poŝto kaj Telekomunikado. Ĝia fondiĝo estis leĝkonforma akto — rezulto de la ekzistintaj dum la antaŭa periodo memstaraj poŝtistaj Esperanto-societoj en la urboj Sofio, Plovdiv, Vraca, Veliko Tŕrnovo, Ruse, Ŝumen, Tolbuĥin, Pazarĝik kaj Jambol.

Pri la bezono de Poŝtista Sekcio kaj pri antaŭstarantaj taskoj raportis Asen Grigorov. La delegitoj pridiskutis la taskojn kaj faris multajn valorajn proponojn lige kun la estonta laboro. Estis elektita estraro de la Sekcio, en kies konsisto estis ankaŭ reprezentantoj de provincaj poŝtistaj Esperanto-societoj.

Dank' al la entuziasmo de la poŝtistoj-esperantistoj estis certigita morala kaj materiala helpo fare de la tiama Ministerio de Komunikado kaj de la lokaj PTT-estraroj, kiuj disponigis materialan bazon kaj bonajn



La fondintoj de Poŝtista Sekcio ĉe BEA — Varna, 1968.

La iniciato por fonda de Poŝtista Esperanto-Sekcio apartenas al la estraro de la Sofia Poŝtista Esperanto-Societo „Heroldo“, kiu jam ĝuis aŭtoritaton kaj popularecon ne nur inter la ĉefurbaj Esperanto-societoj, sed ankaŭ en la tuta lando. En ĝiaj vicoj estis la veteranoj de la Esperanto-movado en nia lando Asen Grigorov, Simeon Simeonov, Dimităr Karagjozov kaj aliaj pli junaj esperantistoj-poŝtistoj, kies nomoj estis konataj al multaj esperantistoj.

La fonda konferenco partoprenis pli ol 50 reprezentantoj de preskaŭ ĉiuj poŝtistaj Esperanto-societoj en la lando, kiuj samtempe estis delegitoj de la nacia Esperanto-kongreso.

kondiĉojn, kaj la laboro de la sekcio iris sukcese.

Multloke estis malfermitaj Esperanto-kursoj por komencantoj kaj estis eltrovitaj malnovaj gekolegoj-esperantistoj. Tiamaniere la Sekcio multe kontribuis por disvastigo la Esperanto-movado en la sfero de Poŝto kaj Telekomunikado.

En nelonga tempo la poŝtistoj-esperantistoj, organizitaj en societoj, kaj kiel individuaj membroj, fariĝis pli ol 250 personoj.

Sendube, por la sukcesoj dum tiu periodo multe kontribuis la organo de la Poŝtista Sekcio „Interligilo“, kiu efektive ludis sian rolon de kolektiva organizanto kaj propagandanto. Sur ĝiaj paĝoj oni ofte povis legi

pri la laboro de tiu aŭ alia poŝtista Esperanto-societo.

Dum la pasinta 20-jara periodo la Poŝtista Esperanto-Sekcio (PES) stabiligis siajn poziciojn kaj okupis indan lokon en la strukturo kaj la sistemo de Bulgara Esperanta Asocio.

La Sekcio okazigis 9 naciajn konferencojn, la pliparto de ili enkadre de naciaj kongresoj de BEA.

La lastaj konferencoj de PES okupiĝis ne nur pri organizaj problemoj, sed ankaŭ pri specifaj demandoj de la teorio kaj praktiko de komunikado. Oni pridiskutis raportojn de specialistoj el la sistemo de la komunikado, kiuj per Esperanto konatigis la partoprenantojn en tiuj konferencoj pri la plej novaj atingoj kaj esploroj

mondskale en la sfero de Poŝto kaj Telekomunikado.

La Sekcio regule partoprenas la socialismu konkuradon, kiun ĉiujare organizas BEA. Dum la lastaj jaroj kaj speciale en la konkurado okazis de la 100-jara jubileo de Esperanto, ĝi okupis honoran lokon.

Nun antaŭ PES staras serioza laboro por preparo kaj aranĝo de la 10-a Jubilea Nacia Poŝtista Esperanto-konferenco en la Internacia Esperanto Kursejo — Pisanica, en septembro ĉi-jare, kiun partoprenos kiel gastoj ankaŭ niaj fremdlandaj gekolegoj.

Draguŝko PETROV

La rememoroj ekparolis

En decembro pasintjare E-societo „Nova Mondo” — Svilengrad, kun prezidanto Dimităr Perĉemliev, festis sian 60-jariĝon. Reprezentanto de CE de BEA estis Dimităr Mutafĉiev, kaj de la distrikta E-organizaĵo en Ĥaskovo — Penjo Stojanov.

Solenan paroladon pri la 60-jara vojo de la societo faris la E-veterano Petăr Sultanov.

Neforgeseblaj rememoroj pri la forpasinta aktiva vivo de societo „Nova Mondo” kun iama prezidanto Angel Laĉev, kaj liaj saĝaj konsilantoj kaj helpantoj Kosta Tringov, Aleksandăr Georgiev (baj Sando), Petăr Sultanov, Asen Săbev, Aleksandăr Vodeničarov, Miĥail Kumbov, Ĥristo Vasilev, Ĵivko Grozev.

Belega junulara tutlanda esperantista balo 1962 en urbo Ruse entuziasmigis la E-junularon en Svilengrad. Partopreno en la 35-a Kongreso de la bulgaraj esperantistoj en urbo Burgas kaj en la 48-a Universala Kongreso en Sofio, junularaj renkontiĝoj en Zlatni Pjasaci, V. Tărnovo, nacia revuo de Esperanta Parolo kaj Kanto en Ĥaskovo, korespondado, malfermo de E-kursoj en la vilaĝoj, radiodisaŭdigoj...

La generacio de kamarado Laĉev estas generacio de entuziasmoj. Mian renkontiĝon kun unu el tiuj entuziasmoj mi povus forgesi neniam, ĉar per ĝi mi eksentis la forton de Esperanto. Malsana, senespera, mi

forveturis al Sofio por enhospitaliĝi. Kaj neatendite en la vagonaro oni faris lokon por mi — agrabla esperanta parolado, mano de amiko. Mia verda stelo konatigis min kun kamarado Simeon Hesapĉiev. Post kelkaj tagoj en nekonata Sofio, en mia hospitala ĉambro eksonis voĉo, ekbrilis verda stelo, freŝis dianoj... Poste la motorciklo kun verda flageto de k-do Hesapĉiev ofte haltis antaŭ nia E-domo en Svilengrad.

Bedaŭrinde tiu domo, sur kies loko nun troviĝas hotelo „Svilena”, estis detruita kaj kun ĝi kvazaŭ estis detruita ankaŭ la vivo de nia societo. K-do Laĉev forlasis nian urbon. Ni, knabinoj, sekvante nian virinan sorton, same forlasis ĝin.

Sed hodiaŭ en la malproksima nordokcidenta angulo de nia lando, apud rivero Timok, en urbo Bregovo, viglas mia nova Esperanta societo „100 jarojn Esperanto”. En la lernejoj en urbo Bregovo kaj en vilaĝoj Kosovo (kie mi loĝas kun mia familio) funkcias E-kursoj de gelernantoj, kun gvidantoj Damjan Ivanov kaj Marin Milanov.

Kaj nun, de tiu ĉi tribunon ni ĵuru, ke la verda stelo de Esperanto estos gvidstelo de niaj estontaj tagoj!

**Donka GEORGIEVA,
Svilengrad Kosovo**

„Fervojisto” festas

La 16-an de aprilo ĉi-jare en la kinsalono de la Sindikata Domo de Transportaj Laboristoj en Stara Zagora okazis solenaĵo lige kun la 20-jara datreveno de la fervojista E-societo en la urbo „Fervojisto”.

Raporton pri la 20-jara aktivado de la societo faris ĝia sekretario T. Vălev. La saman vesperon sur la scenejo de la Fervojista Teatro estis prezentita en Esperanto la teatraĵo „D-ro Zamenhof” de Todor Dimov, esperantisto el Stara Zagora. La roluloj: N. Giĉev (d-ro Zamenhof), M. Lazarova (La edzino de Zamenhof Klara), D. Angelova kaj M. Aleksandrova (la filinoj Lidia kaj Sofia) k. a. ludis bonege kaj estis rekompencitaj per ŝtormaj aplaŭdoj fare de la publiko.

Amase vizitita estis la organizita omaĝe al la jubileo (14. 18.4.1988) Ekspozicio el leteroj kaj bildkartoj. Sur 7 paneloj estis prezentitaj bildkartoj de St. Rusanov (el Francio, Britlando, Aŭstralio), de G. Nastev (el Pollando, Hungario, Germanio), de St. Nikolov (el Damio, Hispanio, Belgio), de T. Vălev, M. Lazarova k. a. (el socialismaj landoj).

Gastoj de la jubilea solenaĵo de societo „Fervojisto” estis samideanoj el Sofio, Varna, Burgas, Velingrad, Gălăbovo, Jambol k. a.

Georgi NASTEV





**Originala
verkaro**

LA VERA PATRINO

Konstantinka ARSOVA

La nokto estis malluma. Sur la malsekera ĉielo, pelate de la vento, la nuboj jen disiĝis, jen kolektiĝis, formante pezan, nepenetreblan kurtenon.

En la ĉambro nur la vekhorloĝo sur la noktoŝranko rompis la silenton per sia monotona „tik-tak“. Ĉe la malfermita fenestro sidis mezaĝa svelta virino. Ŝia malhela hararo jam estis griziĝinta sur la tempioj. Ŝiaj nigraj okuloj estis malĝojaj, ŝia vizaĝo elspiris melankolion.

Grandaj pluvgutoj ekfrapis sur la fenestron. La vento fleksis la branĉojn de la arboj. La virino revere aŭskultis la susuron de la pluvo. Ŝia rigardo ekvadis sur la malsekaj stratoj, ekŝvebis sur la malserena ĉielo. Rememoroj invadis ŝian konscion, revenigis ŝin dek du jarojn malantaŭen. Kvazaŭ tuta eterneco forpasis de tiam. Dek du jaroj, plenaj de amo kaj familia feliĉo!

Tiam Elena estis 32-jara bela virino. Ŝi edziniĝis en juna aĝo, sed la edzo montriĝis drinkemulo kaj ŝi eksedziniĝis post kelkaj monatoj. De tiam ŝi evitis la virojn.

Sed foje ŝia najbarino konatigis ŝin kun 35-jara viro, alta, simpatia, ankaŭ eksedziniĝinta, kun naŭmonata filo. Lia edzino forlasis lin pro alia viro. La bebo bezonis multajn zorgojn, sed la patrino de Dimitro jam estis maljuna kaj malsana. La soleca patro devis edziĝi denove.

Elena kaj Dimitro plaĉis unu al la alia. Ŝi vidis en li suferintan viron kaj fidindan kamaradon, kiu povus redoni al ŝi la kredon al la homoj. Li esperis trovi en ŝi sindonan edzinon kaj patrinon de lia infano. Post kelke da monatoj ili estiĝis

Konstantinka Arsova estas aktiva membro de la Sofia Literatura Rondo, kiu portas la nomon de Sia fondinto kaj multjara gvidanto Asen Grigorov.

Ĉi-sube, sub nia tradicia rubriko „Originala Verkaro“, ni proponas al niaj legantoj unu el ŝiaj rakontoj. La verko, kolorita per virina sentemo, emocias per la sincera deziro de la aŭtorino defendi la juston.

„BE“

geedzoj kaj ekvivis feliĉe. Dimitro ne elrevigis ŝin. Ekfluis trankvila, sennuba feliĉa vivo dum dek du jaroj.

Tamen subite nigra nuboj ekpendis super la familio: Maria, la unua edzino de Dimitro, aperis tiel neatendite, kiel ŝi iam estis malaperinta. Ŝi estis edziniĝinta al komerca reprezentanto kaj multajn jarojn vivis kun li en fremlando. Nun ŝi revenis Sofion. Maria havis ĉion. Nur infanon ŝi ne havis. La edzo estis bona, zorgema homo, sed li multe volis havi infanon kaj ofte parolis al ŝi pri tio. La ombro de senfrukteco estiĝis ĉiam pli densa kaj kvazaŭ sufokus ŝin. Oni devis fari ion! La edzo proponis, ke ili adoptu infanon. Ho, ne? Maria havis filon — kial ŝi ne serĉu lin? Vere, ŝi forlasis Dimitron, forlasis sen konscienciproĉoj ankaŭ la bebon, kiun ŝi naskis. Tiam ŝi eĉ por momento ne supozis, ke iam ŝi pentos pri tio. Kaj nun nur unu deziro obsedis ŝin: trovi Dimitron kaj restarigi sian patrinrajton sur la filo. Ja li estas ŝia, ŝia!

Iun sabaton tagmeze oni sonorigis ĉe la pordo. Elena malfermis kaj vidis antaŭ si ankoraŭ junan, elegante vestitan virinon.

— Pardonu, ĉu tie ĉi loĝas Dimitro Metodiev? — demandis la nekonatino.

— Jes, — Elena rigardis ŝin kun intereso. — Kiu vi estas kaj kial vi serĉas lin?

— Mi estas... kiel klarigi al vi... Mi estas lia parencino, mi longe loĝis en alian landon. Reveninte mian naskiĝurbon, mi volus vidi ĉiujn miajn parencojn. — Maria estis kontenta pri sia rapide elpensita respondo.

— Mi komprenas, sed li ne estas hejme, — diris Elena.

— Ho, bedaŭrinde! Mi ege esperis trovi lin. Kaj lia filo? Li havis filon, ĉu ne?

— Ne havis, sed havas! Nia filo! La voĉo de Elena nevole ektremis.

— Ĉu vere? Mi ne sciis, ke li estas ankaŭ via filo! — Maria malbone kaŝis sian ironion. — Sed kiam mi povus vidi ilin? Ĉu vi havas telefonon?

— Jes, tamen se vi volas serĉi mian edzon, mi devas scii, kiu estas via nomo, por diri al li.

La nekonatino ekrigardis Elenan kun antipatio kaj diris:

— Do, bone. Mi iel sukcesos trovi kaj lin, kaj lian filon!

Ŝi abrupte turnis sin kaj ekmalŝupuris laŭ la ŝtuparo.

Elena malrapide fermis la pordon. Neklara maltrankvilo kaptis ŝin je la gorgo. Kiu estas tiu virino? Kial ŝi serĉas Dimitron? Pro kio ŝi interesiĝas pri Vladko?

Maria haltis sur la strato. Ĉu ŝi atendu lin? Sed ĝis kiam? Ŝi ne devis denove serĉi lin en lia domo. Kiamaniere ŝi trovos lin? Sed jen ĉe la proksima stratangulo aperis viro portanta bazartekon, el kiu montriĝis kelkaj boteloj da biero. Maria atente ekrigardis al li. Jes, tio sendube estas li! La hazardo helpis ŝin.

— Dimitro! — mallaŭte ekkriis Maria, kiam la viro proksimiĝis. — Mitko!

— Maria! — Li haltis kaj ekrigardis ŝin konsternite.

— Mitko, vi preskaŭ ne ŝanĝiĝis. Ĉiam vi estis la sama.

— Vi tamen multe ŝanĝiĝis. Mi apenaŭ rekonis vin. — Post la unuaj momentoj de miro li reekhavis sian memregadon. — Kaj kiamaniere vi eksciis mian novan adreson?

— Ne estis tiel facile. Vi havas belan edzinon, sed negasteman. Ŝi rigardis min tiel suspekteme...

— Jes, bela kaj plej grave — saĝa kaj boha. Ŝi zorgas pri mia filo kiel vera patrino.

— Pri nia filo! — ŝi korektis lin.

— Jes, pri nia filo. Finfine vi rememoris ke vi havas filon? — li mirigite levis la brovojn.

— Ĉu vi scias Dimitro... Mi forgesis lin neniam, sed tiuj vojaĝoj... Mia edzo estas komerca reprezentanto kaj ni longe loĝis en eksterlando...

— Do, vi sukcesis bone aranĝi vian vivon! Verŝajne vi havas infanon?

— Ne, bedaŭrinde! — ŝia voĉo tremetis. Mi havas grandan peton al vi: permesu al mi vidi Vladkon. Ja mi estas lia patrino, mi amas lin...

— Vi amas lin? Kiel kortuŝe! Via patrina sento vekiĝis finfine? — la ironio en lia voĉo rigidigis ŝin.

— Dimitro, mi vidas, ke vi ne kredas al mi. Jam delonge mi revas vidi lin. Malgraŭ ĉio, mi havas tiun rajton kaj vi ne povus rifuzi al mi!

— Mi povus, kompreneble, sed vi scias, ke mi ne estas tia homo. Vi vidus lin, sed unue mi devas paroli kun mia edzino.

Ili parolis ankoraŭ kelkajn minutojn kaj li promesis telefoni al ŝi.

Hejme Dimitro rakontis detale al Elena la konversacion, kun sia eksedzino. Kio do — estas home! Ŝi rajtas vidi sian filon. Elena jam delonge diris al Vladko, ke ne ŝi naskis lin. Ŝi sciis, ke iam iu diros al li la veron. Estus pli bone, ke li sciuj ĝin de ŝi. Nun ŝi volus peti sian edzon, ke tiu renkontiĝo ne okazu. Sed ŝi ne kuraĝis...

Kaj jen ili triope sidis ĉe tablo en malgranda dolĉaĵejo. Maria preskaŭ ne rigardis al la viro sidanta apud ŝi, sed ŝiaj okuloj avido observis la vizaĝon de la knabo. Kaj la knabo estis bela, svelta, bone edukita. Kiel saĝe li parolis!

— Vladko, filo mia, — flustris Maria, — mi petas vin veni en mia hejmo, gastu ĉe mi iom da tempo. Mi konatigos vin kun mia edzo — li estas tre bona homo. Se vi scius, kiajn belajn donacojn mi preparis por vi...

— Mi venos, sed nur por kelkaj horoj.

— Bone, mi estos danka al vi.

— Eksciinte, ke Vladko gastos ĉe sia patrino, Elena ege ĉagreniĝis. Malbonaj pensoj forprenis ŝian dormon. Se

malgraŭ ĉio li ekŝatus tiun, kiu naskis lin? Se li ekamus ŝin? Ja li estas ankoraŭ infano!

Estis antaŭ ses monatoj. Dimanĉe, frue posttagmeze Vladko trapasis la sojlon de sia patrino. Oni renkontis lin tre afable, sidigis lin sur la divano, ĉe tablo kun diversaj frandaĵoj. Li kun intereso rigardis la lukse meblitan ĉambron. La donacoj multe plaĉas al li, sed tamen li rifuzis preni ilin. Li sentis sin ĝenita kaj volis tuj forlasi ĉi-domon. Post multe da petoj kaj persvadoj fare de lia patrino, li prenis la donacojn, dankis kaj foriris.

— Valdko, ĉu vi venos denove?
demandis Maria. Diru al mi, filo mia, diru, kiam vi venos?

— Mi ne scias, la knabo levis la ŝultrojn. — Sed mi venos iun tagon.

Maria skribis sur papereto sian telefonnumeron kaj etendis ĝin al li.

— Telefonu al mi ofte. Kiu estas via telefonnumero?

Ne, ne estas oportune, ke vi serĉu min... Mi telefonos al vi.

— Mi kredas al vi, filo mia. Ĉu vi scias — post kelke da monatoj ni forveturos denove. Ĉu vi volas veni kun ni? Estus bonege!

— Ne, mi ne volas forlasi miajn gepatrojn! — la junulo aspektis decidema kaj nedelogebla.

Sur la strato Vladimir demandis sin mire: — Ĉu tio estas la virino, kiu naskis min? Tiel pompe vestita kaj bela... sed kial ŝi forlasis min, kiam mi estas bebo? Kio devigis ŝin fari tion? Mia patro estas tiel bona homo. Ne, kompreneble, mi ne telefonos al ŝi. Mi ne deziras denove vidi ŝin!

Sed Maria decidis rehavi sian filon ĉiupreze. Ŝi eksciis, en kiu lernejo estas Vladimir kaj preskaŭ perforte kondukis lin en sian domon. Tie ŝi superŝutis lin per frandaĵoj kaj donacoj. Kaj iom post iom en la animo de la knabo ekestis kontraŭdiraj sentoj. Tiu stranga virino eble vere amas lin... Lia dua patrino estas multe pli kara al li. Kompreneble, li amas nur ŝin kaj sian patron. Kaj tamen...

Iun tagon Dimitro revenis hejmen deprimita, zorgoplena. Elena tuj komprenis, ke okazis io malbona.

— Mitko, kio estas al vi? — ŝi demandis.

Nenio, mi nur estas laca.

Li rifuzis vespermanĝi kaj ekrapidis al la dormoĉambro. Sed Elena ne povis resti indifera.

Mi bone konas vin, Mitko, almenaŭ mi pensas tiel... Vi ege maltrankviligos min, se vi plu silentos.

Jes, tion oni ne povas prisilenti, aŭdigis sin Dimitro. Mi ne volus maltranviligi vin, sed hodiaŭ Maria deklaris al mi, ke ŝi pretendas antaŭ la tribunalo pri siaj patrinaj rajtoj... ŝi volas preni la filon.

Ŝi volas preni Vladkon? preskaŭ ekkriis Elena. — Ne, nur tio ne!

Trankviliĝu, mia kara! La justas estas je nia flanko. Kiu povus forpreni de ni la filon, kiun ni kreskigis kaj edukis ekde lia naskiĝo? Mi petas vin, trankviliĝu!

La tagoj trenis sin streĉoplenaj, maltrankvilaj, senfine longaj. Venis la tago, kiam Dimitro kaj Maria ekstaris en la juĝejo unu kontraŭ la alia, hirtigintaj, koleraĵ, pretaj por decida batalo.

Oni prokrastis la proceson. La juĝistoj decidis doni la lastan vorton al la filo, kiu baldaŭ estos 14-jara.

Fulmo trakuris la malluman ĉielon kaj forta tondro deŝiris Elena de ŝiaj pensoj. La pordo malfermiĝis kaj sur la sojlo ekstaris Dimitro.

— Mi pensis, ke vi dormas kaj ke la tondro timigos vin. — Li lumigis la lampon, alpaŝis al ŝi, ekrigardis fikse ŝian vizaĝon.

— Kio estas al vi? Ĉu io doloras vin?

— La koro doloras min — obtuze ekflustris Elena... — Ĉu vi finis vian laboron?

— Jes. Ni devas kuŝiĝi. Estas malfrue. Mi fortrinkis la dormigan kuracilon. Trinku ankaŭ vi la vian kaj ni dormu. Morgaŭ ni devas esti viglaj.

— Jes, morgaŭ... — ekĝemis Elena.

La morgaŭa tago estas decida kaj kaŝas tiom da maltrankviloj.

La proceso — tria laŭvice, komenciĝis je la deka. En la malgranda halo estis brue. Sur la benkoj sidis kelke da scivolemaj aŭskultantoj. La juĝistoj okupis siajn lokojn kaj starigis silenton. La proceso devis esti mallonga, ĉar la juĝistoj kaj la atestantoj jam donis siajn depozi-

ciojn. La lastan vorton havis Vladimir. Li trankviligis sian patron kaj sian duan patrinon, ke li neniam forlasos ilin. Sed li tenis sin iel strange, kvazaŭ li mem ne estus konvinkita pri sia decido.

La knabo ekstaris antaŭ la juĝistoj. Oni direktis al li la fatalan demandon:

— Ĉe kiu vi volas loĝi — ĉe via patro aŭ ĉe via patrino? Ĉiuj ĉesis spiri. La silento estis streĉita kaj teda.

*Vladimir ekparolis malrapide. Komen-
ce lia voĉo tremis, sed iom post iom li venkis sian emocion.*

*— Kamaradoj juĝistoj, mi estas dan-
ka, ke vi donas al mi la rajton decidi,
ĉar tiu ĉi demando tuŝas plej multe min.
Vere, Maria Dragoeva naskis min, sed ŝi
forlasis min, kiam mi estis bebo, Nun ŝi
serĉas min, certigas min, ke ŝi ne povus
vivi sen mi, ŝi donas al mi donacojn...
Sed ŝia edzo estas tute fremda por mi.
Ĉu mi povus diri al li „paĉjo”? Ja mi ha-
vas patron, kiu estas tiel bona! Ankaŭ
ŝin mi ne povus rekonii kiel patrinon kaj
mi ne povus diri al ŝi „panjo”. La virino,
kiu ne naskis min, sed edukis min kaj
zorgas pri mi... ĉu mi povas ne ami ŝin?
Ŝi kaj nur ŝi estas mia vera patrino!*

*La emocio en la halo atingis sian kul-
minon. La homoj flustris: „Brave, kna-
bo!”*

*Elena paliĝis pro emocio. Ŝi ŝanceli-
ĝis, kaptis sin je la vando, sidigis sur la
proksiman seĝon kaj kovris sian vizaĝon
per manoj. La larmoj, kiuj delonge sufo-
kis ŝin, nun abunde surverŝis ŝian viza-
ĝon. Tio estis larmoj de ĝojo, de feliĉo.
Vladimir proksimiĝis al ŝi, karese ĉir-
kaŭprenis ŝin kaj flustris: „Trankviliĝu,
panjo! Mi ne plu deziras vidi tiun viri-
non!”*

*La septembra suno leviĝis alte en la
ĉielo. Ĝiaj radioj, varmaj kaj mildaj, ka-
resis la vizaĝojn de la preterpasantoj.
Sur la strato marŝis viro kaj virino, kaj
knabo inter ili. Ilia ĝojo estis evidenta,
iliaj vizaĝoj brilegis pro feliĉo. Elena ek-
rigardis la sennuban ĉielon. Kia vetero
estis hieraŭ vespere! — Ŝi pensis, — kaj
nun eĉ ne estas spuro de la nigraj nuboj!
Estis forpasinta ankaŭ la ŝtormo en ŝia
animo. Disŝiriĝis, malaperis la nubo, kiu
pezis sur ilia familio. Vladimir estas ŝia
filo kaj neniu povus forpreni lin de ŝi!*



Ni recenzas

VALORA ELDONO

Germana Antologio (ekde la plej frua epoko ĝis ĉ. 1700). Tradukis: W. Hermann kaj H. Rössler, Redaktis: O. Brodt. 327 p., ilustr., 19 cm. Gerlingen: Eldonejo Bleisher, 1985.

La unua jarmilo de la germana li-
teraturo (ekde la plej frua epoko ĝis
1700) estas prezentita en *Germana
Antologio* belaspekta eldono de
Eldonejo Bleisher (Gerlingen,
FRG). Ĝi ampleksas la fruĝermanan
epokon, la tempon de la Karolidoj
kaj Otonidoj, la tempon de la troba-
doroj, la malfruan mezepokon, la
Renesancon kaj Humanismon, la
Reformacion kaj Barokon. La Anto-
logio havas traŝan strukturon: la ĉa-
pitroj komenciĝas per literaturhisto-
riaj enkondukoj pri la periodoj, an-
taŭ iuj verkoj estas donitaj biografiaj
notoj pri ties aŭtoroj, kaj tradukitaj
fragmentoj de la verkoj estas kunli-
gitaĵoj per resumo de la cetera enha-
vo, kio donas kompletan bildon pri

la verkoj. Cio ĉi helpas la leganton
orientiĝi kaj pli bone ekkoni la ka-
rakterajn ideojn de la germana lita-
raturo, ties poeziajn rimedojn kaj
ĉefverkojn en la diversaj periodoj.

La fruĝermana epoko daŭris
ĝis la definitiva kristaniĝo de la ĝer-
manaj gentoj, ĝis Karolo la Granda
fondis sian regnon fine de la 8-a
jarcento. El tiu epoko nur tre mal-
multaj dokumentoj germane skribi-
taj ekzistas la plej rimarkindaj es-
tas la sorĉformuloj de Merseburg,
montrantaj la kredon de la paŭloj
je la magia forto de sorĉkantoj, kaj
fragmento de la „Hildebrand-Kan-
to” (ĉ. 810), kiu prezentas la
konflikton inter la soldata honoro
kaj genta sento.

La politika agado de Karolo la
Granda, kiu regis inter la jaroj 768
kaj 814, determinas la evoluon de
la tempo de Karolidoj kaj Otonidoj
(763-1024). Ĝi karakteriziĝas per
akcelita disvasitiĝo de la krestanis-
mo kaj fondo de monaĥejoj kun ler-
nejoj, kiuj estiĝis centroj de la kultu-
ra vivo en la frua mezepoko. La
idearo de la literaturaj verkoj deve-
nas el la sintezo de ĝermanaj kaj
kristanak konceptoj pri vivo, mondo
kaj religio. El tiu periodo indas men-
cii „Heliand-eposon”, la plej malno-
va germana poemo, en kiu estas
entreprenita provo konsciigi la
biblian temon en la figuroj de la
feŭda-heroa eposo.

La tempo de la trobadoroj
(1050-1250) venis, kiam la klaso
de la feŭda kavalararo fariĝis plej
influhava kaj gvidanta. Kantado kaj
poezio estis ege ŝatataj en ilia me-

dio. La trobadoroj riĉigis la germanan naciĝon kaj mondan literaturon per ravaj verkoj. Ĉeftemoj de la trobadoraj kantoj estas la sublimigita amo al la nobelaj virinoj kaj glorigado de la kavaliraj vivmanieroj kaj aventuroj. La kavalira literaturo servis al la kulto de virinoj kaj herooj. De 12-13 jc datumas la lastaj redaktoj de „Nibelunga Kanto“ (i. 1200), famekonata popola epopeo, kiu prezentas heroojn rakontojn el la frua germana historio pri la neniigo de la ŝtato de burĝonjanoj („nibelungoj“) fare de hunoj en la jaro 436.

En la Malfrua Mezepoko (burĝa kaj klerika literaturo ĉ. 1250–1400) daŭris la trobadora tradicio malgraŭ la malapero de kavaliraj virtoj. La germanaj urboj, kies metioj kaj komerco ekprosperis, iom post iom ebligis memstaran kulturon de la klerikoj kaj burĝoj, kiuj pozitive influis unu sur la alian. El la Malfrua Mezepoko indas menci la germanlingvan dialekton prozon de la mistikuloj Majstro Eckhart, H. Seuse kaj J. Tauler, kiuj riĉigis la germanan lingvon per kreado de novaj vortformoj.

Dum la Renesanco kaj Humanismo (1400 ĉ. 1517) prosperas la humanisma literaturo, havanta klare kontraŭreligiajn direkton (Stultula ŝipo de S. Brant). Per la studado de antikvaj tekstoj (grekaj, latinaj kaj eĉ hebreaj) la eruditaj klopodis retrovi kaj revivigi la vivgöjjon kaj precipe la aprezojn de la individua personeco samkiel ties rajton kaj devon evoluigi ĉiujn individuajn fortojn kaj talentojn. Pro tio la Humanismo estas intime ligita kun la Renesanco. *Germana Antologio* prezentas ankaŭ la faman nederlandanon Erasmus de Rotterdam, kiu per sia granda klereco kaj forta kredo je la bono en la homo estis tre influhava en tuta Eŭropo.

La Reformacio (1517–1620) karakterizigas per skismo de la kristana eklezio. Martin Luther senmas kigis la papan Romon, lanĉis novajn ideojn pri la libera volo kaj la individua respondeco, pri la senpera rilato de la homo al Dio. Per sia traduko de la Biblio li kreis novan komunan altgermanan lingvon, kio esprimis povon li priskribas en la konata „Sendletero de la tradukado“. La kantoj de la Kamparana Milito (1524–1526) kreis revolucionan direkton en la germana literaturo. La predikoj de Tomas Muntzer, gvidanto kaj ideologo de la plebaj kamparan amasoj en la Reformacio kaj la Kamparana Milito, unuafoje en Germanio estas inspiritaj de komunisma idealo, kvankam en religiaj formuloj. Proteston kontraŭ la feŭda subpremado kaj bigoteco esprimas la verkaro de la majstrokantisto H. Sachs kaj la drolaj rakontetoj kaj


farsoj de J. Fischart. Rimarkindaj estas la t. n. „popularaj libroj“ („La burĝoj de Silda“).

La literaturo de 17-a jc evoluas en la kondiĉoj de la Tridekjara Milito (1618–1648) kaj de ĝenerala spirita krizo. Martin Opitz defendas la principojn de klasikismo, strebante forigi la dependecon de la germana literaturo de la aliaj eŭropaj literaturoj („Libro pri la germana poezio“). Plej grandan disvastiĝon ĝuas la literaturo de Baroko (P. Fleming, D. C. Lohenstein, Chr. H. Hofmannswaldau), kun kiu estas ligita ankaŭ la verkaro de la dramaturgo kaj poeto A. Griphius kaj de la prozisto H. J. Chr. Grimmelshausen,

aŭtoro de la romano „Simplicius Simplicissimus“ — supro de la germana literaturo dum 17 jc. — respegulinta la tragikan sorton de la popolo en la dezertigita de la milito lando. Transira figuro de la Baroko al Racionalismo estas J. Chr. Gunther.

La lingvaĵo de Germana Antologio estas klasikeca kaj preskaŭ senripoĉa. La libro estas tre bone redaktita kaj legiĝas kun ĝuo. La volumo estas bonguste ilustrita per multaj reproduktajoj de malnovaj manuskriptoj kaj de ligno- kaj kuprogravuraĵoj.

Evgeni GEORGIEV



ESPERANTISTA KALEŜEGO

Kaleŝego demonstrita de la esperanta grupo „Antaŭen“ en la hispana urbo Aviles

Ĝi prezentas la terglobojn ĉirkaŭita de homaj siluetoj, kiuj ĉirkaŭprenas la mondon kaj kantas. La siluetoj same similas la esperantan homaron, kiu ĉirkaŭbrakas la mondon fratece

En la antaŭa parto du babelturoj kunigitaj per ĉeno malebligas la progreson kaj la konkordon de la homaro, tamen papera barketo konstruita el esperantaj revuoj donas la duzon dank' al reciproka fido inter la popoloj rompi la ĉenojn de la internacia opozicio

Nicolás. MUÑIZ ALONSO,
Aviles, Hispanio





Distroj

ONI LERNAS TUTAN VIVON

Laŭ unu el la lastaj esploroj de UNESKO la angloj devas klopodi ok jarojn meze, por ke ili povu skribi sufiĉe senerare en sia lingvo. Hispanoj estas en plej favora pozicio. Por atingi tion, ili devas penadi du jarojn. Plej multe devas klopodi la japanoj. Ili lernas kiamaniere oni devas skribi japane nur post kiam ili posedas superan klerecon.

Oni mencias, ke por skribi iun nomon, la japano devas koni 160 hieroglifojn.

MALKOVRU LA DIFERENCOJN



Malkovru kaj priskribu en Esperanto la ok diferencojn inter la unua kaj la dua bildoj. Inter la solvintoj de la tasko la redakcio lotumos esperantan libron.

AMUZA ZODIAKO



VIRGO

(24-a de aŭgusto — 24-a de septembro)

Virgoj tre prudentas, rezonemas,
kaj ĝentilas, bonas, koleremas.
Ruze sin aranĝas en la vivo,
eĉ parencoj ĝojas pri aktivo.

Ili al ĉiulo komplezemos,
tuj kompanse... ion postulemos.
Se li estas viro — analizas,
ĉian agomanieron skizas.

Spiras ĉiam li per kontprecizo —
pri benzino, vestoj, mona krizo.
Mane se kaptiĝas rego granda —
do neniun tentos predo franda.

Se virino, estas serv-afabla,
tro principa kaj memorkapabla.
En atendo ŝajnas Penelopa...
Virgo estas ŝi ja, sed kokremas,
kaj la edzon lerte ruztrompemas.
Trompas, maskas... celon ŝi atingas,
sed la spiritaĵon finestingas!

Vi proksimas, — Virgoj vin estimas,
se vi fremdas, al diablo sendas!
Fiŝoj ties trukojn priatentas —
ĉiam malbonaĵon ekpreventas.

Esperantigis: Asen JOSIFOV

Rakontu al viaj korespondantoj pri BULGARA NACIA KOSTUMO



La bulgara nacia kostumo estas produkto de la kolektiva, tutpopola krea agado. Ĝi respegulas la regionajn geografiajn kaj ekonomiajn kondiĉojn en la lando kaj prezentas la miljaran evoluon de la bulgara etnografa kulturo.

Dum la kvin jarcentoj de la osmana jugo nia popolo konservas sian nacian kostumon, same kiel siajn lingvon kaj nacian senton. Ĝis la fino de la XIX jc la bulgara nacia kostumo estas simpla, neinfluita de la novaĵoj en la industrio. La hejme faritaj ŝtofoj estas solidaj, precipe en la naturaj koloroj de lano. Kiam oni kolorigas la teksaĵojn, preferataj fabroj estas malhelblua, ruĝa, nigra kaj pli malofte — verda. Kiel bazaj materialoj estas uzataj lano, kotono, silko, kanabo k. a. Plibeligas la vestojn fantaziaj ornamaĵoj, teksitaj aŭ broditaj.

Vira aŭ virina la bulgara nacia kostumo egale ravas per sia varieco! Ĉe la viraj kostumoj oni povas konstati du bazajn specojn — nigra kaj blanka, depende de la speco de la ŝtofo, de la koloro kaj modelo. La nigra kostumo estas portata preskaŭ en la tuta lando kaj la blanka estas tipa nur por kelkaj regionoj en Norda Bulgario.

Pli granda varieco ekzistas ĉe la virinaj kostumoj — ili estas kvar specoj:

- Kostumo kun dua antaŭtukoj, riĉe ornamitaj per brodaĵoj, kreita surbaze de malnova slava tradicio. Tiu tipo estas disvastigita en Nordokcidenta Bulgario kaj laŭ la fluo de rivero Danubo.

- Sukmana kostumo — fermita lanrobo (sukmano) kun aŭ sen manikoj, el lanŝtofo — ordinare nigra, blua, violblua, siringkolora k. a. Ĝi ankaŭ estas ornamita per brodaĵoj, filigranaj-pasamentaj kaj silkaj aŭ kotonaj ornamfadenaj. Ĝia kompono estas influita de la frua mezepoka vestaĵo. Pro sia praktikeco tio estas la plej disvastigita virina kostumo en Bulgario.

- La kostumo kun saĵao (longa manikohava robo el kolora ŝtofo), tute malfermita ĉe la antaŭo, vestita sur la ĉemizoj kaj ĉiam surzonita per antaŭtuko. Estas disvastigita precipe en la sudaj landregionoj.

- Vesto kun unu antaŭtuko bluzo kun antaŭtuko, kiu kovras la virinan korpon sub la talio. Ordinare oni povas vidi ĝin en la sudokcidenta parto de nia lando.

Apartan atenton meritas la nacia kostumo en la regiono de montaro Rodopi. Estas organizitaj specialaj sciencaj esploroj de tiu tradicia popola vestaĵo en ĝia plena varieco.

En la nuna tempo, ĉe la novaj sociaj vivkondiĉoj, la modeloj de vestoj en la urboj kaj la vilaĝoj rapide egaligas, sed la malnovaj tradiciaj vestaĵoj kreitaj de nekonataj majstroj restas kiel valoraj produktoj de la popola arto, modelo de fantazio kaj beleco.

La bulgara nacia kostumo estas riĉa fonto por diversaj aplikaj kaj praktikaj artoj kaj metioj kaj por la teksindustrio. Elementoj el la tradicia nacia kostumo estas uzataj kiel modelo ĉe tajlado kaj konstruo de la nuntempa moderna virina vestaĵo.

Nun en nia lando ekzistas la Bulgara Nacia Etnografa Muzeo en Sofio kaj ĝiaj filioj en aliaj urboj. Krome, ekzistas pli ol 30 etnografiaj fakoj ĉe la historiaj muzeoj (kun pli ol 400 000 valoraj muzeaj eksponaĵoj). La celo de tiu institucio estas konservi aŭtentikajn objektojn de la tradicia materia kaj spirita kulturo — nedividebla parto de la kompleta historia heredaĵo de nia popolo.

Lilija KOLEVA

NIA INSTRUISTA KLUBO

Dum la pasinta lernojaro ĉe la Domo de Instruisto en Gabrovo funkciis 15-membra Klubo de instruistoj parolantaj Esperanton, kun gvidanto Sonja Tiĥova.

Ĉiunomate ni kolektiĝis kaj parolis pri diversaj temoj, anticipe sciigitaj al la klubanoj, kaj ĉiam kantis novan kanton.

La klubanoj eksciis pri la laboro de la Jubilea E-kongreso en Varsovio, pri la historio kaj pri la arkitekturaj vidindaĵoj de urbo Lodzo kaj de la palaco Neboruf en Pollando.

Dum nia junulara kunveno ni rakontis pri la novjara kutimo „Novjara kuko kun bondezizoj” kaj ni kantis la novjaran kanton „Abio, ho!”.

En februaro kaj marto ni parolis pri la 1-a martaj kutimoj — „Legendo pri la Martenico” kaj „La Martenico en Gabrovo-regiono”, surbaze de materialo kolektita de Milka Nedjalkova, membro de nia klubo kaj gvidanto de grupo „folkloro” en 1-a baza lernejo „Ran Bosilek”. Estis aranĝita ekspozicio de kolorfotoj pri la disvolviĝo de la Martenico (el la kolekto de M. Nedjalkova).

En aprilo kaj majo mi rakontis kaj projektis diapozitivojn pri Hindio. Pere de Esperanto la klubanoj eksciis pri la vivmaniero, arkitekturaj monumentoj, naturo kaj historio de Delĥio, Agra, Gajpur k. a.

Aktive partoprenis la paroladojn Nadeĵda Kanĉeva, Kosjo Kolev, Djanko Minĉev, Penko Penkov k. a. Teknika respondeculo estis Ganka Ĥristova.

Sonja TIHOVA

FONDKUNVENO DE SOCIETO „PENKA MIĤAJLOVA”

La 2-an de junio j. k. la tago, en kiu ni bulgaroj kliniĝas antaŭ la memoro de la pereintoj por justeco kaj libero, esperantistoj el la sofia komunumo Serdika okazigis sian fandan kunvenon. Tiu tago estis elektita ne hazarde, ĉar la societo portas la nomon de Penka Miĥajlova, heroe pereinta en batalo kontraŭ faŝismo. Sian nomon la E-societo heredis de la eksa subdistrikta societo.

Oni elektis novan estraron kaj aprobis jaran laborplanon. La ĉeestantoj elektis kiel prezidanton de la societo Lasto Nikov.

La membroj de la novefondita societo

starigis multajn gravajn demandojn disponigi al la societanoj propran klubon, organizi E-kursojn en la komunumo, altiri junulojn. Nun en la societo membras precipe pensiuloj kaj laboristoj-fervojistoj kaj tramistoj.

La fondkunvenon partoprenis Radoslav Paraŝkevov, sekretario de la Organiza Komisiono ĉe CE de BEA. Post la kunveno la ĉeestantoj ornamis per freŝaj floroj la memormorplaton de Penka Miĥajlova.

Atanas BORISLAVOV

NIA KONTRIBUO

La 12-an de aprilo ĉ. j. la estraro de esperantista societo „Nikola Ŝopov” En Sofio okazigis sian regulan kunsidon, kie oni pri-

diskutis la novajn rekomendojn kaj decidojn pri la renovigo de BEA. La estraranoj trarigardis la kondiĉojn kaj eblajn divi-

la societon je tri partoj kaj tiamaniere fondi tri apartajn societojn laŭ la teritoria principo. Ili unuanime decidis organizi ekstran kunvenon kaj proponi al la membroj la dividon de societo „Nikola Ŝopov” je tri komunumaj societoj: ĉe la komunumoj „Ilinden”, „Vâzrajthane” kaj „Krasna Poljana”. Pri tiu ĉi decido estis sciigitaj ĉiuj membroj de la societo kaj invitataj partopreni la ekstran kunvenon.

La 28-an de aprilo en la salono de legejo „Iskra”, kie ordinare oni okazigas diversajn esperantistajn aranĝojn, la membroj de la ĝisnuna societo „Nikola Ŝopov” kunvenis lastfoje. Kiel gastoj estis invitataj sociagantoj el la tri komunumoj. Partoprenis ankaŭ Radoslav Paraŝkevoj — sekretario de la Komisiono pri Organiza Agado kaj Cvetka

Miteva, sekretario de la Komisiono pri Internacia Agado.

Laŭ la tagordo la partoprenantoj aŭskultis mallongan raporton pri la agado de la societo dum la lasta unujara periodo. Ivan Ivanov legis la raporton de la kontrol-revizia komisiono kaj post la diskutoj kaj voĉdonado la du raportoj estis aprobitaj unuanime.

Kiel prezidanto de la E-societo ĉe Komunumo „Ilinden”, kiu konservas sian ĝisnunan nomon „Nikola Ŝopov”, estis elektita Maria Slavĉeva — instruistino en 15-a meza lernejo „Adam Mickeviĉ” kaj ĝisnuna sekretario de la societo. Kiel prezidanto de la societo en Komunumo „Vâzrajthane” estis elektita Ivan Ivanov kaj en komunumo „Krasna Poljana” — Jordan Jordanov.

Inĝ. Orlin HAFIZI



La Komunuma Komisiono pri Spirita Evoluo, esperantista societo „Lumo” kaj la societo de la filatelistoj en Veliko Târnovo komune okazigis **Semajnon de Esperanto-Kulturo** de la 13-a ĝis la 18-a de majo 1988. La 13-an de majo en la ekspozicia halo „Vasil Mavrikov” la prezidanto de esperantista societo „Lumo” Angel Nedjalkov prezentis al la centoj da esperantistoj kaj gastoj Mariana Zlateva, kiu en la nomo de la Komisiono pri Spirita Evoluo inaŭguris ekspozicion dediĉitan al la Semajno de Esperanto-kulturo. Ŝi emociie parolis pri Zamenhof kaj pri la historio de la Esperanto-movado en Veliko Târnovo. La atenton de la publiko altiris la ekspoziciitaj bildkartoj pri naciaj kostumoj el la tuta mondo kaj la kolekto el lernolibroj de Hristo Dolĉinkov, la valora kolekto el

Esperantaj poŝtmarkoj, kovertoj kaj bildoj de Zdravko Nikolov. Apartan intereson provokis la kolekto de Nedjalka Radojĉeva el poŝtmarkoj kaj filokartoj pri temo „flo-roj”, kaj la kolekto de Hristo Abaĝiev „Legendoj pri Târnovgrad”. La saman tagon en la salono de la komunuma domo okazis solena Esperanto-programo. Ĝi inkluzivis recitalon de Petja Aleksandrova, Esperanto-kantojn de la ĉambra ĥoro el Gorna Orjaĥovica, direktata de Enĉo Balanov, kaj Esperanto-kantojn de la pionira Esperantorondo ĉe lernejo „Vela Piskova” en Veliko Târnovo.

La aranĝon ĉeestis esperantistoj el Gorna Orjaĥovica, Polski Trâmbeŝ, Dâskot kaj Pavlikeni.

Ivanka CANEVA



Deziras korespondi

BULGARIO

JORDANKA MILENOVA (30-jara, ekonomistino) Varna 9000, ul. „Haji Stamat“ 31 kun ĉl. Kolektas BR, PM kaj gramofondiskojn.
NIKOLINA PAŠALIJSKA (14-jara) Sofia 1115, kv. Mladost 4, bl. 470, et. 4, ap. 101 kun ĉl pri muziko, sporto. Kolektas BK kaj PM.
ARGIR ZIDANOV (36-jara, medicina teknikisto), kun ĉl pri medicino, scienco, abelbredado, ŝakludo, kaj liaj filinoj Silvia (12-jara) kaj Emilia (9-jara) — kun ĉl. Adreso: v. Bojno 6730, obl. Haskovo.
ELICA DIMITROVA (15-jara, lernantino) Ruse 7013, jk. Iztok, ul. Budapeŝta, bl. „Strahil vojvoda“ vh. A, et. 5 kun ĉl pri sporto. Kolektas memorarojn.
ASJA HAĜIEVA (14-jara, lernantino) Ruse 7013, jk. Iztok, ul. Jana vojvoda, bl. „Rajna knjaginja“ et. I, ap. 5, p. k. 5 kun ĉl pri sporto, muziko, literaturo. Kolektas BK.
RALICA RUSEVA (15-jara, lernantino) Ruse 7013, ul. „Budapeŝta“ bl. „Strahil vojvoda“ vh. A, et. I kun ĉl. Kolektas kalendarojn kaj memorarojn.
DEISLAVA STEFANOVA (16-jara, lernantino) Ruse 7013, jk. Iztok, bl. „Kalman vh. A, et. 5, ap. 12, p. k. 12 kun ĉl pri moderna muziko kaj problemoj de nuntempa junularo.

ĈEĤOSLOVAKIO

BLANKA FALTINKOVA (40-jara, flegistino) Předměstí n. Lab. 50302 Školska ul. 321 kun ĉl pri ĉt. Kolektas BK kaj PM.

NEDERLANDO

ANTON BLICKMAN (67 jara) Haarlem VV 2026, Palamedesstraat 17 kun ĉl pri tridimensia fotografio, naturaj orkideoj, papilioj, historio de la abelbredado en Bulgario.

POLLANDO

MARCIN UNIEJEWSKI (17-jara) — Jastrzebie — Zdroj 44 335, ul. Opolska 8/26 — kun ĉl pri naturo, historio kaj arkeologio.
GRAZYNA ZAWADA (22-jara, instruistino) — Belchatow 97 400 Os. Dolnoslaskie 130/7 — kun ĉl pri lingvo, muziko kaj turismo.
KRYSZTOF MAKSYMOWICH (40-jara, kuracisto) — Loda 91 315, Ks. Brzoski 36, m. 2 — kun bulgaraj esperantistoj pri ĉt.
ROMUALD ŚLOIZDEK (28-jara, muzikisto) — Lublin 20 209, ul. Melgoscza 7/9 m. 59 bl. I kun ĉl pri klasika muziko kaj fremdaj lingvoj (germana kaj angla)
ELZBIETA KRAWIEC (33-jara, instruistino) — Szczecin 70 885 ul. Uzdrowskowa 2 kun ĉl pri turismo, literaturo kaj muziko.
ADAM MALINOWSKI (26-jara, instruisto) Krakow 31 416, ul. Sloneckiego 6/48 kun ĉl pri turismo, naturo kaj vojaĝoj.

SOVETUNIO

RUTA GRIGONYTE (15-jara) Skriaudziai 234355, Prienu raj. str. Vilties — 5 — Litovio kun ĉl pri ĉt.
OLGA ABRAMOVA (15-jara, lernantino) Ĉeljabinsk 454080, ul. Lenina, 73 18 kun ĉl pri turismo, naturo, fotoarto kaj moderna muziko.
ESPERANTO-RONDETO (gelnantoj, 12 20 jara) Vilnius 232000, str. Ukerges 43, Palaco de Pioniroj kun ĉl pri ĉt.
ALEKSEJ DANILOV (37-jara, laboristo) Belaja Kalitva 347000, Rostovskoj obl., ul. Kalinina 20, 1/7 kun ĉl pri surtablaj ludoj, krucenigmoj kaj liaj intersaj ŝatokupaj, kolektas PM.
FETINGYTE BIRUTE (19-jara, studentino) Vilnius 232054, str. Sauletekio 8 1102 Litovio kun ĉl pri ĉt.
VLADIMIR BORZIKOV (28-jara) Risovoje 334917, K. Perekopska distr., Krimea reg. kun ĉl pri ĉt.

NI KONDOLENCAS


La 7-an de novembro 1987 forpasis Vera Vajarova, naskita en 1907 en urbo Kjustendil. Vera Vajarova estis talenta operkantistino, plenumantino de la ĉefroloj en multaj operoj („Madam Butterfly“, „Toska“, „Bohemoj“ k. a.)

Kiel esperantistino Vera Vajarova ofte ĝuigis la publikon per sia brila recitado de E-poezio, kiu distingiĝis per profunda kompreno, per plej subtila esprimo de ĉiu sento kaj penso de la aŭtoro. Ŝiaj ŝatataj E-poetoj estis Zamenhof, Julio Baghy, Kolomano Kalocsay, Elvira Jippe, Ljudmila Evsejeva, Marjorie Boulton k. a.

Ni estime kliniĝas antaŭ ŝia hela memoro!

ABONU KAJ ABONIGU REVUON

Bulgara Esperantisto



Ĉu vi jam abonis revuon „Bulgara Esperantisto“ por 1988? Se vi feris aŭ ne sukcesis fari tion vi pro aliaj kaŭzoj, ankoraŭ havas tempon. Tamen ne prokrastu! Iru al via poŝtejo kaj certigu al vi tutjaran regulan ricevadon de nia revuo! Ne preterlasu aboni la organon de Bulgara Esperantista Asocio ankaŭ por viaj eksterlandaj amikoj.

● Per la revuaj paĝoj vi festos kune kun ni la 70-jariĝon de „Bulgara Esperantisto“ — unu el la plej malnovaj E-periodaĵoj en la mondo!

● En nia revuo vi trovos interesajn legaĵojn por ĉiu aĝo.

● Legante la revuon, vi ekscios multe da E-novaĵoj, informigos pri diversaj aspektoj de la movado kaj ĝuos agrablajn minutojn kun nia „Distra paĝo“.

● Vi trovos viajn preferatajn rubrikojn: Lingvaj demandoj, Esperanto en profesioj, Originala vekaro, Leteroj de korespondamikoj, Juna Esperantisto, Verdaj Steletoj, Deziras korespondi...

● De tiu ĉi numero „Bulgara Esperantisto“ estas presata per pli moderna tekniko kaj vi ĝuos pli belaspektan kaj luksan eldonon!

„Bulgara Esperantisto“ estas abonebla per la poŝto ankaŭ en ĉiuj socialismaj landoj. Alilandanoj, kiuj deziras aboni nian revuon, bonvolu sendi la abonkotizon laŭ la konto de Bulgara Esperantista Asocio, ĉe la Centra Oficejo de UEA, Nieuwe Binnenweg 176 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Ĉi-sube ni proponas al via atento ankaŭ la nomaron de niaj eksterlandaj perantoj:

BRITIO: S-ro Paul Hewitt, 26 Highfield Road, North Thoresby Grimsby, South Humberside DN 36 SRT.

FEDERACIA RESPUBLIKO GERMANIO: S-ro Roland H. Hegen, Schlossgasse 30, D—6738 Elms-tein.

FRANCIO: S-ro Gilbert Gerrier, Esperantista Federacio de Laboro, 179, rue Ordener, 75018 Paris; tel. 252.19.36

HISPANIO: S-ro Adonis Gonzales Meana, str. Marcelino Gonzalez 5—4, D Gijon-9 (Asturias); tel. (985) 15 15 34 Por leteroj kaj korespondadoj: Apartado 24233280 Gijon — Asturias.

JAPANIO: S-ro Yoshiaki Mizuno, Hanazono 1 — 2418 — 18 Tokorozawa 359 JAPAN.

Ĉiu deziranto estiĝi peranto de „Bulgara Esperantisto“ en landoj, kie la revuo ne havas reprezentantojn estos afable akceptita.

La „kosmaj“ saltoj de Stefka Kostadinova



Ĉu laŭ vi alta salto je 165 cm estas granda atingo? Nun ĉiu junulo aŭ junulino sin preparanta por „grandaj“ konkuroj, priridus vin, se vi kuraĝas aserti ion similan. Sed la 7-an de aŭgusto 1932 Los-Anĝeleso aplaudis la unuajn mondajn rekordulinon pri tiu malpezatletika fako. Jean Shily kaj Mildred Dittrichson. Ilia atingo estis 165 cm. Ĝuste post 40 jaroj ankaŭ Bulgario havas sian unuan mondrekordulinon pri alta salto — Jordanka Blagoeva, kiu en Zagrebo (24.9.1972) plibonigis la mondan rekordon, transsaltinte la laton je alto de 194 cm. Per ŝi komenciĝis la „ora“ stafeto pri alta salto ĉe virinoj. Kelkajn jarojn pli malfrue la bulgaraj ŝatantoj de sporto salutis ankaŭ nian duan mondrekordulinon — Ljudmila Andonova, kies atingo estis 207 cm. Kaj tuj post ŝi sur la sporta firmamento ekbrilis ankaŭ la „stelo“ de Stefka Kostadinova, nun unuanime konsiderata „unua damo“ en tiu sporta fako.

Antaŭ 4 jaroj, kiam en la tradicia enketo de la bulgaraj ĵurnalistoj Stefka Kostadinova estis elektita „Sportisto de la jaro“, ankaŭ mi unuafoje intervjuis ŝin. Sed tio tute ne estis brila intervjuo — la ĉarma kaj bela Stefka estis tiom silentema, ke mi povis eltiri de ŝi preskaŭ nenion. Tamen, finfine, la materialo estis preta. Kaj de post tiu tago mia intereso al ŝi ege kreskis, malgraŭ ke mi estas „specialisto“ pri akvaj sportoj. Mi vere admiris ŝin — ŝian scipovon montri „feran“ karakteron, ne perdi la memregadon, regi siajn nervojn en tre streĉaj, „infarktaj“ momentoj, mobiliziĝi kaj koncentriĝi, kiam tio estas plej necesa. Kaj ĉio ĉi — estante apenaŭ 22-jara! Ŝi ravis la mondan sportan publikon per siaj (de iu tre trafe nomitaj!) „kosmaj saltoj“: 207 cm, 208 cm, monda rekordulino per 209 cm! Ŝi estas venkinto en 53 konkursoj kun atingoj super 200 cm, kaj el 359 ŝiaj provoj salti super 200 cm, 88 estis sukcesaj. En 1986 kaj 1987 la

Monda Sporta Akademio kun sidejo en Francio distingis ŝin per la premio „Oskaro“. Do ŝi gajnis ĉiujn eblajn rekordojn kaj titolojn — dum konkuroj en halo kaj sub libera ĉielo. Kaj nun ŝia celo estas la olimpika titolo...

Antaŭ nelonge ni denove renkontiĝis — ĉi-foje en ŝia naskiĝurbo Plovdiv. Ŝi gastis ĉe siaj parencoj, por dividi kun ili sian ĝojon pro la nova granda rekono — en aprilo ĉi-jare, en Parizo, mem la prezidanto de la Internacia Olimpika Komitato Juan Antonio Samaranch emanigis al ŝi la grandan premion por sporta majstreco „Monique Berliou“ por 1987. Al mia demando pri detaloj lige kun la solenaĵo organizita honore al ŝi en la bulgara ambasadejo en Parizo, Stefka respondis: „Mi rapidis reveni hejmen — ne, mi ne troigas! Nun mi ne devas perdi eĉ minuton, mi devas streĉe min prepari al la olimpiaj ludoj. Miaj plej seriozaj konkurantinoj estas Ljudmila Andonova, Svetlana Isaeva kaj Emilia Dragieva (Bulgario), Tamara Bikova, Larisa Kosicina kaj Ljudmila Avdeenko (USSR), Suzanne Beir kaj Gabriele Gunz (GDR), Luisa Riter el Usono kaj Silvia Costa el Kubo...

Ĝis septembro ĉi-jare, kiam en Seulo kunvenos la plej fortaj sportistoj el la tuta mondo, Stefka Kostadinova partoprenos en kelkaj grandaj internaciaj turniroj. Mi kredas, ke post ĉiu el ili ŝi revenos kun venko. Kaj krome, ankaŭ pri io alia mi kredas — ke ŝi ĉiam restos la sama silentema kaj modesta junulino, kiun ĉiuj admiras!

Maria JOREVA